



Peresperanta politika gazeto tutmonda por la interesoj de la homoj

MOTO: „NUR LA HOMARO ENTUTA ESTAS EN VĖRO LA HOMO“ (Goethe)

Eldonanto: *Johann Fildstedt* — Industrie- und Handelsgesellschaft „Continental“ m. b. H., Bremen, Langenstr. 60

ENHAVO: Kulpo kaj kompenso. / La pereco de la Okcidento — la kulturo morgaŭa. / La religia prasento. / La ekonomia vivo en Germanlando kaj ĝiaj geografiaj fundamentoj. / La ekonomia stato de Germanlando sub la postefikoj de la mondmilito. / Germana propono pri riparadoj. / La germanaj fervojoj 1910—1920. / Neniam plu milito. / El la sortlibro de la homaro. / Pri la problemoj de la germana-franca interkonsento. / Diversaĵoj. / Libro.

Kulpo kaj kompenso

La demando pri kulpo ĉefe estis decidiga pri la ordigo de la postmilita stato en Eŭropo.

Vivo aŭ morto de milionoj da homoj dependas de la respondo.

Malgraŭ tio la demando estis esplorata nur supraĵe kaj pritraktata laŭ jam fiksitaj opinioj, laŭ pretaj deziroj kaj celadoj partiaj.

Tial ankaŭ ne povas rezulti solvo kaj pliboniĝo, sed nur konfuzo kaj ruiniĝo.

Pro tio ni sentas nin devigata, esprimi ankaŭ nian opinion pri la demando pri kulpo.

Estas malsaĝe voli forigi sangmalsanon malaperigante ĝiajn eksterajn simptomojn, aŭ ekstermi fiberbon fortranĉante la kapon sed lasante kreski la radikojn.

Ni fosas pli profunde:

Kiu kaŭzas la mondmiliton? Kulpaj estas nek Anglio, nek Francio, nek Germanio solaj; nek socialistoj, nek konservativuloj, judoj aŭ antisemitoj, agraruloj, industriuloj, kelkaj jurnalistoj trompemaj, tiranmurdistoj aŭ kultur-malamantaj landestroj; nek ĉi tiu reĝo, imperiestro, prezidanto, nek la unu aŭ alia ministro, politikisto, diplomato, ŝvistlernanto k. t. p. Certe, ili ĉiuj estas pli-malpli kulpaj pri la militeksplozo. Sendube. Sed faktaj kulpuloj ili ne estas. Neniu justa tribunalo povas kondamni ilin. Trompitaĵoj, trompintoj, puŝitaj puŝintoj.

Kiu estas kulpa pri la mondmilito?

La ŝtatano estas kulpa. La ŝtatanon akuzu. La ŝtatano estas la mortiganto de la libereco. La ŝtatano, kiu plej alta ŝatas la opartunecon; kiu nenion pli mala-

mas ol esti ĝenata; la ŝtatano, kiun tedegas aliaranĝo kontraŭkutima; la ŝtatano, kies devizo estas — ili fendu al si reciproke la kraniojn, kaj ĉio konfuziĝu, se nur mia hejmo ne estas tuŝata; la ŝtatano, kiu ekde la unua momento, kiam li eniris la mondon, celas vivi sate kaj glate en la malkvieteco de l'vivo. Sole la ŝtatano estas kulpa, la ŝtatano en ni ĉiuj.

Ĉi tiu ŝtatana tipo sin trovas en ĉiuj klasoj kaj landoj. La ŝtatana humileco, kiun naskis malkuraĝo kaj inerto — „Trankvileco estas la unua civitana devo“ — kreis la staton, el kiu la milito devis estiĝi.

Ni celas Germanion, sed alilande sin montras la samo:

La germana malvirto, „kuŝadi sur la urselo“, t. e. la kuŝemo faris la politikan socion de samrajtaj viroj la ĝisnuna ŝtato.

La ŝtato, kies katenoj ligas nin, estas la organizaĵo por la bono de unu klaso, populare nomata kapitalismo aŭ sovjetismo, kiun Rusio estigis.

Ke ĉi tiu unu klaso, pere de la ŝtato, laŭplaĉe, senbride, kiel servutigulo povas disponi pri la popolo, ĝi ja ne dankas al eminenta spirita kapableco de siaj anoj, sed nur al la inerta servutemo de la ŝtatano evitanta la penadojn de memregado priresponda.

La ŝtatanaj virtoj: evitiri ĉiun malpacon, la libervola submetiĝo, la ŝoviĝo surventra antaŭ la pretendema eleganta trompulo nur ebligis al ĉi tiu, ekokupi la komence nur pretenditan estrecon.

„Vi plendas, ke fiero ĉiam de l'potenculo premas vin; ŝanĝigos tuj, se vi neniam kun kurba dorso flatas lin.“

La konsciencon, komence ankoraŭ memorigantan pri antaŭa rezisto, oni penadis kvietigi elpensante sanktaĵojn, kiuj estas: dio, imperiestro, patrolando, popolo kaj ŝtato — al la memstara pensulo kompreneble ĉiam ordinaraj, ŝanĝeblaj je graveco —; sed la ŝtatano juĝas ilin nerefuteblaj, por kvietigi ĉiujn skrupulojn — pro malkuraĝo.

Antaŭ ĉio la ŝtaton ŝatis la ŝtatano kiel aĵon tronantan super li; ĝin li faris unuaranga idolo oferante al ĝi kreeman vivon kontraŭ tombosilento. Ke la ŝtato estas nur rimedo; por atingi celon, sed neniam celo, kompreneble la ŝtatano rapide kaj volonte profunde forgesis. Lia penado bonege sukcesis. Kiel kompenson li kreis la ekklezion.

La ekklezio, kiu estas korelativa al religio kiel mumio al viva homo, ree kaj denove predikas al li de sur la predika pupitro, ke sin submeto sub la sorton estas virto sensarĝanta la konsciencon. Senzorge li povis dormi. Sed nun fortegaj battoj vekas lin. Nun li ĝemas kaj veplendas. Nun suferante li estas malkontenta. Sed ankaŭ nun li ne ankoraŭ ekpensas, ke sole li estas kulpa. Tiel ĝisfunde li trompis sin mem. Estas necese, ke li tion ekkonu, por povi esperi pli bonan staton.

Serĉi pekinton estas malĝusta vojo. Helpkrio pri „forta viro“ ankaŭ estas senutila. Li ne serĉu pliboniĝon ekstere. Sole per propra forto la ŝtatano gajnos la liberecon de la homeco. Estas necese detruigi la ĝisnune decidigan „timon agi“.

Kaj la dua postulo estas: ribelu! Ribelu kontraŭ vi mem! Ribelu kontraŭ la hodiaŭa ŝtato.

Kion plenumis la ŝtato? Ĉiuj epokfarantaj progresoj en tekniko, scienco kaj arto estis efektivigataj kontraŭ la kontraŭstaro de la ŝtato. La ŝtato celas garantiĝi la superregecon al la unu klaso, kies rango neniel estas sekvo de iaj eminentaj geniaj talentoj. Tion oni ebligas nur, perforte subpremante la spiriton.

La spiriton la ŝtato celas devigi iri ordonitan vojon. La spirito estas subpremata per la ekonomia ligado. Se la homo ekonomie estas dependa, se li dankas la ĉiutagan panon al la favoro aŭ kaprico de aliulo, li ankaŭ spirite ne estas libera. Sed por vivi estas la spirito la plej grava; senbarita evoluo kaj vastampleksa okupiĝo de la intelekto estas la ĉefaj postuloj por la feliĉo de la homaro. Sed la ujo por la spirito estas la homo. Tra la homo kondukas la vojo de la spirito al la produktado reala. Kaj ree: „Per la homo la homo estras la parolon.“ (Edda.) Do ŝirmo al la homo.

Ĉia akcelado de la talentoj estu la tasko de la socio.

La ŝtato faras la kontraŭon. La malnovan ŝtaton ni ĉesigu. La ŝtato por si mem ne estas supera aĵo destinita konservi sin en la sama formo ĝis eterne. La ŝtato estas formo, nur formo. Kaj kiel ĉiu formo ankaŭ la ŝtato estas ŝanĝebla kaj devas laŭigi sin al la enhavo, aŭ tute estu formetota. La malnova ŝtato similas al infanvesteto por plenkreskulo aŭ Prokrustolito. Foren!

Alvenu la nova socio! Jen ago! ja ne efektivebla per ekkrio aŭ mansigno, sed nur per ĉies mentala alisinaranĝo.

Ne timigu vin tiuj, kiuj profitas el la ĝisnuna posedŝtato. „Perfido kontraŭ patrujo; patriotismo!“ oni ĉirkaŭbruadas, oni flatas vin. Estas blufado, trompo. Vi ja ne fakte povas ami galerulkatenojn, aŭ bestligilojn kondukantajn al buĉejo.

Al ĉi tiu ŝtato ni ne estas pli ol laborhundoj aŭ ludiloj: objektoj.

Sed ni estas homoj — suverenaj — direktantaj. Ni volas esti nova socio, favori unu la alian, homoj samrajtaj, por evoluigi la individuecon.

La unua kondiĉo: Ribelu kontraŭ vi mem!

Ĉiun balaston transbordigu! Historio estu pasinteco. Vi ja ankoraŭ travivas la metodon ĉiutage. „La plej granda parto de la historioj estas mensogoj, intermiksitaj kun malmulte da veraĵoj. Multaj personoj skribis historion, malmultaj diris la veron.“ (Frederiko II., reĝo en Prusio).

Forgesu, kio estis hieraŭ. Neniu elvoku la praulojn. La mortintoj estas mortintaj, kaj la estinteco estas pasinta. Sed ni ekzistas!

Ni mem do aranĝu nian vivon laŭ propra juĝo. Toleri ke putrint-mortintoj interparolu estas malprudento. „Ĉio, kio estis, estas erara. Ĉiu grado ĝis ĉi tiu nuna, unua, tutnuna momento de la estado estas agregato, soblosako, barikado. Barado interne de ĉiu valoro, halto, inerta malcedo kontraŭ la pripensado pri nia ekzisto devenanta el nia spirito. Ni devenas el la spirito, kaj jen ni ekzistas. Ĉiu tago, kiun ni vivas, ĝis hodiaŭ vivis, estas la milfoja morto. Se, kio pasis, ne estus eraraĵo, senvalorajo, kazematajo, ne ĉio estus pereinta. Detruu la pasintan.“ (Ludwig Rubiner „La homo estu la centro“.)

Ne kredu al aŭtoritatoj! Titoloj kaj dekoraĵoj ne blindigu vin. Ne demandu, de kie iu venis. Ĉu el ĉielblua dormĉambro, ĉu el malseka, malluma kelo. Ĉu edzeca devo aŭ libera amo estigis lin. Blonda aŭ nigra. Longkraniulo aŭ rondkraniulo. Indiferente. Antaŭjuĝoj pasis, ne indas nin. Ni ne plu konas ilin. Homo li estas. Tio sufiĉas. Jen la tuto. Kiel homo ĉiu estas samrajta al la alia. Ĉiu ŝatu sian proksimumon kiel sin mem. La pluan decidu la sociala laboro, severe ekzamenita. Cetere ĉio estas libera. Li povas agi aŭ neagi, laŭplaĉe, se li nur ne al la aliulo sen lia permeso piedpremas la kolojn. Kaj povas pensi, kredi, ami, kion kaj kiun li ŝatas, laŭ emo. Kiu aprobas la liberecon, kiu klopodas helpi la kunhomon, tiu estos akceptata kiel samrajta membro de la nova interligo. Ĉiu estas responda pri la alia. Ne ekzistas politika prestiĝo, ne rangoj, sed nur kunuloj egalrangaj. Limoj ne ekzistas. La terglobo estas nia distrikto. Nacieco estas, kiel religio, privata afero. Politikaj limoj ne plu baru ankaŭ la ekonomiojn.

Devizo: terglobulo.

Unue ni ĉiuj liberigu nin el ĉiuj katenoj de hereditaj opinioj. Ni formetu la okulvitrojn ĉia-partianajn. Nokto, komence — ni konsciigu esti unikaj. Ne havante plu antaŭjuĝojn ricevitajn de aliuloj ni denove komencu ekzameni kaj elekti mem. La konduto: „ĉion kompreni estas ĉion pardoni“, estas pekego. La devizo estas: Decidiĝu! Ĉiu kaj ĉiuj fiksu sian pozicion. Neniel ekzistu konsideroj al supre, konsideroj al malsupre, konsideroj al dekstre, konsideroj al maldekstre. Elektu tion ĉi, rifuzu tion. Kiu ne obeas ĉi tiun devon, estas kulpa.

Ni citu ekzemplojn: Kulpaj estis kaj estas la kristanoj ne obeantaj la ordonon de Jesuo: „Amu viajn amikojn!“ Ankaŭ tiuj, kiuj ne plenumis la pli malnovan leĝon: „Ne mortigu!“ Kulpa estas la verkinto, kiu skribis dum la milito kiel soldato ĉi tiujn fundamentajn frazojn, sed ne sufiĉe penadis gajni la kamaradojn kaj instigi ilin, simile al li, fakte kontraŭi la militon.

Nekulpaj estis la anglaj militservon-rifuzintoj. Gloron kaj dankon al ili. Senmezure ili servis al la ideo de la domo.

Kulpaj estis la socialistoj, kies devizo estis: „Proletarioj ĉiulandaj, unuigu!“, sed kiuj ĉe militeksplodo ne riskis realigi la postulon, sed enĉerkgigis ĝin ĝis oportunaj tempoj.

Konsiderante la Ruhr-konflikton ni diras, ke en Germanio ĉiuj estas kulpaj, kiuj ne energie kontraŭstaris la sabotagon; ne instigis la registaron fari bonbazitajn proponojn; ne klopodas, ke ĉesu la konfuzo en la interna administrado; ke egaligu la superfluo unuflanka kaj la mizero aliflanka.

Kulpa estas la Internacio de la laboristoj ne farante fine siaflanke taŭgan proponon solvi realigeble la riparadproblemon. Ne estas malfacile. La laboristoj nur havu la firman intencon, kaj ili estos kapablaj. Sufiĉe da tiel nomataj „inteligentuloj“ estas pretaj asisti ilin. Konstante nur rezolucii estas malutile.

Kulpaj estas ĉiuj en Francio, kiuj, se ankaŭ ne aprobante la Ruhr-okupadon, tamen ankaŭ ne kontraŭas al sia registaro, konsentas pri la monrimedoj kaj voĉdonas por montro al konfido. Kulpaj en Francio estas tiuj, kiuj malhelpas, ke germanaj laboristoj, laŭ plurfoja propono, laboru en la detruita regiono. Kulpa ankaŭ estas Ameriko, kiu kunhelpis ĵeti Eŭropon en abismon, sed arogante kaj farizee sin retenas, fiera pri sia pureco.

Kulpaj ankaŭ estos tiuj, kiuj, se ili konsentas al nia batalado, ne helpas nin laŭ ĉiu povo, ĉu per spirita aŭ mona subtenado; kulpaj ankaŭ tiuj, kiuj, malkonsentante, ne kontraŭstaras nin.

Nia tasko estas: ataki ĉiun potencon bazantan sur perforto kaj celantan subpremadon, falegi idolojn, pioniri al ĝermanta vivo vojon kondukantan al harmonio.

„Nur la homaro entuta estas en vero la homo.“ G.

La pereco de la Okcidento — la kulturo morgaŭa

De A. Francé-Harrar

Verkis la edzino kaj ĉefa kunlaborantino de certe hodiaŭ en Germanio plej eminenta biologo Raoul H. Francé.
(La redakcio)

Se libro eksterordinare sukcesas, estas kutime necese esplori la kaŭzojn, alikaze oni ofte maljuste juĝas kaj opinias ĝin pli grava aŭ malgrava, ol ĝi fakte estas. Ĉar tio okazas — kiel alie estiĝis la moda esprimo pri „alamasa sugestio pri gusto kaj juĝo“ — estas preskaŭ normo, ke la libro certajn por la akcepto en la legantaro favorajn faktojn intermiksas kaj substituas, por ke poste la malpreciza misksaĵo estu prezentata kiel famaĵo.

La verko de O. Spengler, sendube, unue rikoltis la sukceson de eksterordinare bona kaj efika titolo „Pereco de la Okcidento.“ Ĉi tiu vorto frapis kaj emociis la per la mondmilito kaj ĝiaj nesupervideblaj sekvoj konfuzitajn, turmentitajn kaj timigitajn homojn. Ni ĉiuj ja emas juĝi, ke la propra malfeliĉo koncernas la tutan mondon. Kaj ankaŭ ĉi tiu libro, kies unua volumo aperis ankoraŭ dum la teruraj jaroj de la hombuĉado, iom montras la influon de ĉi tiu evidente antropocentra devigo. La libro ja estiĝis en Germanio, kaj la aŭtoro estas bona germano, kiu, en pardonebla troigo en la premeĝo kaj minacanta ruiniĝo de sia patrolando do ekvidas reflektajn de la pereco de la tuta okcidenta kulturo. Mi opinias, ke tio por la tuta mondo ĝenerale estas klara kaj komprenebla — tamen objektivite ekrecozante la libron oni devas konsideri ĉi tiun psikan kuneligitecon.

Sed aliflanke estas necese, ke ankaŭ ĉiuj aliaj eŭropanoj, ne konsiderante siajn opiniojn, sin okupu pri la senduba dekadenco de la okcidentaj homo kaj kulturo. Ĉi tiu maljuniĝinta kaj evidente kadukiĝanta kontinento travivis tiom da provoj de ŝtatformado kaj amasigis ĝis turalto tiom da civilacioformoj, ke ĝi al senpartiuo prezentas sin kvazaŭ kiel tuŝita de konstante plimalboniĝanta historia lepro. Do estas merito de Spengler, ke li laŭ nova kaj — ni anticipas — biologa ordigo la amasigitajn civilaciojn dispartigis kaj, malgraŭ ke li rifuzas la natursciencan en la historio, juĝas ilin funkcioj de la vivo, naskiĝo, kulmino de la agado kaj morto. Se ĉi tiu vidpunkto ja ne estis tute nova — ĝi ja bazas rekte sur Goethe kaj Nietzsche kaj precipe intence volas evoluigi la lastnomitan, — ĝi tamen kiel ĉiu biologa ideo estas eminente fekunda. Per tio oni facile povas kompreni, ke la „Pereco de la Okcidento“ ja ne enhavas novan ideon, tamen multe da bonaj kaj nekutimaj ideoj. Kaj se ankaŭ la submeto de la historiaj interilatoj sub la tiamajn vivoformojn, kaj, kiel manifestiĝo de iliaj sekvoj ne ĉiam ĝisfunde klare ebligas, tamen la fundamenta principo ne estas tuŝata. Sed la demando pri „logiko de la historio“ entenas la dolorigan spiritkonfuzon de la

eŭropano, kiu ne kapablas ekkoni la treege komplikitan sencon de la historio travivita de li en liaj propraj generacioj. Ankaŭ tio estas pluo de la Spenglera verko, ke li, malgraŭ multe da nepruvitaj paradoksoj kaj sagaca simboligo, revekis la signifon de la pasinta tempo por la nuna kaj la estonta kaj starigis ĝin kiel sciindaĵon.

Do ĉi tiu libro kaj la ĝin kreinta mondopiniaro enhavas tragikan skismon. La libro estas ankaŭ kvazaŭ Faŭstkonfeso, se ankaŭ de tiu Faŭsto, kiu petegis la terspiriton, ekstremis antaŭ ĝi, sed ne havante diablon kiel akompananton helpantan al li venki la mondon. Malgraŭ ke Spengler profetas je proksima estonteco la eminentan kaj suverenan diktatoron, kaj opiniante, ke sekvos epoko de militistaj imperiestroj, li tamen kredas, ke la ruiniĝo de la malnova Eŭropo estas nedeturnebla. Kvankam konvinkite, ke ĝi ne plu povas krei geniajn verkojn, ĉu komponaĵojn, ĉu pentraĵojn, ke stoicismo kaj socialismo estas simptomoj de la dekadenco, ke la moderna fiziko staras ĉe la limo de la ekkoneblo, ke nur Budho, Sokrates kaj Rousseau estas la eminentaj gvidantoj de civilizacioj, li tamen kvazaŭ per la unu mano disbatas la idealon, kiun li per la alia penadas konstrui, kaj, nomante la Okcidenton senespere pereanta formitaĵo, fakte senvalorigas siajn proprajn ideojn pri ĝia renesanco.

Ke malgraŭe ĉi tiu verko estas kvazaŭ limŝtono en la eŭropa kulturideo, tion kaŭzas la konfuza spirita stato de laŭ ĉiuj vidpunktoj sin orientanta moderna intelekta homo, kiu stato ja ankaŭ sur ĉiuj paĝoj klare respeguliĝas kun ĉiuj siaj bonkvalitoj kaj malperfektaĵoj kaj ne permesas al la kuraĝa kaj altencelanta Spengler formi kaj tute perfekte estri sian ampleksekan scion.

Certe: nepre necesa estas la ekkono de la danĝerigo, en kiu troviĝas la eŭropaj kulturideoj kaj iliaj rezultaĵoj, sed tio nur estas la unua paŝo — se eble ankaŭ la plej malfacila — kaj ne sufiĉas. Spengler forlasas nin kun la nura konstato de malesperigo, ĉar certe ja ne ĉiuj liaj legantoj kontentiĝos, se li vortpentras al ili malproksiman epokon de estonta kulturfeliĉo, efektivegebla nur per tio, ke rea Tiberio, rea Cezaro kun senmezureblaj soldataroj antaŭe ĉion pieddispremas. Estas eble, ke ankaŭ en ĉiuj ĉi tiuj asertoj la „Pereo de la Okcidento“ nur estas simptomo de la ĝenerala intelektkonfuzo de Eŭropo, kiu unuflanke laŭeble celas subtilegan kulturon, ĝin eĉ tie, kie la natura evoluo de la popoloj neniel garantias ĝin, provas surglui ĝin artifice — oni prezentu al si ekz. la klopodegojn antaŭ la milito civilizati la Balkanpopolojn, dum ĝi aliflanke penadas konservi la propramovan sovaĝecon de primitivaj popoloj kaj per multe da agitvortoj kulturi la fanatecon de la murdo.

Sed la — se ni ĉion konsideras: nekontentiga — provo de la Spenglera verko montras, ke oni obeante la devigon de la neceseco devas ekiri novajn vojojn al la kompreno.

La tuta Eŭropo similas al malnova potenca kaj granda familio, en kiu la antaŭa intenseco de la generinstinkto iom post iom malfortiĝas, kaj la familianoj, se ili fine

ne volas estingiĝi, estas devigataj, vole-nevole pli atenti siajn sanecon, agadon, posteulojn. La kulturo hieraŭa kaj antaŭhieraŭa tro okupis sin uzi profitdone la akiritajn havaĵojn kaj akiri pliajn, aŭ pasie batale decidi la pro ili kaŭzigitajn konfliktojn. La kulturo morgaŭa havos kaj havu novajn celojn.

La libreto de la filozofo R. H. Francé, kiu aperis sub ĉi tiu titolo kaj nur estas unu el la de li, kaj nun ankaŭ jam de lia disĉiplaro verkita libroserio, por meti fundamenton al lia „Objektiva filozofio“, sin okupas pri ĉi tiuj problemoj. Se ĝi komence la tutan novan idearon ja nur volas supraĵe konturi, tamen ĝi estas plena de gisnune nekonataj kaj fruktoportaj ideoj. Antaŭ ĉio ĝi ne kontentiĝas nur konstatante la malprogreson kaj pereon, sed montras vere novajn kaj ireblajn vojojn por plibonigi la nunan staton. Ĉi tio pozitiva kaj kreanta, faras ĝin fakta malo al la verko de Spengler, kiel ankaŭ la mema sen-antaŭjuĝa konsiderado de nia nuna kultur-stato, dum en la antipodo sin trovas ankoraŭ multe da humanist-filozofaj tradicioj.

Al Francé, kiu krome estas unu el la plej famaj kaj produktemaj biologoj en Germanio (i. a. la elpensinto de la kreskaj-psikologio), sekve la mondo nur estas evoluaĵo. La blinda fatalo ludanta ankaŭ en la Spenglera libro gravan rolon (li ja kredas, ke ĉiu kulturo posedas sian propran prisortan ideon) do ne estas por li unu el la mondo-konservantaj, mondo-detruantaj demiurgoj. Je la unua fojo la homaro estas libera de teruro multaĝa kiel la homaro mem. Ĉar, se ĉio estiĝis, laŭleĝe estiĝis, ni ja nur bezonas ekkoni la faktojn de ĉi tiu estiĝo, por scii, kial ĝi hodiaŭ tia aŭ tia estiĝis, sed precipe, por ne esti devigata submeti sin al ne atenditaj evoluoj, sed povi influi ilian pluan iradon.

La penso estas tiel simpla kaj klara, ke estas preskaŭ hontige, ke nur nun homa cerbo ĝin ekpensis: Ĉiu organismo, ĝi estu ĉu vivaĵo, ĉu ŝtato, ĉu popolo (do, pli precize dirite: ĉiu sistemo, kiu nur vivas tiel longtempe, kiel ĝi konservas la komunikadon inter siaj malsamaj partoj, sed mortas, se la interkomunikado daŭre estas interrompita) posedas laŭ siaj kapabloj kaj naturaj karaktero kaj kvalitoj ankaŭ certan evolueblecon. Rozo nur povas flori kiel rozo, ne kiel lilio. Tiele ankaŭ organismo povas evolui nur konforme al la esenco de la organismo mem. Sed ĝi obeas al la medio, kiu jen favoras, jen malfavoras, jen malakcelas, jen akcelas, ĉiam iel per multe da influoj ŝanĝas ĝin. El ĉi tiu egaligo inter medio kaj individueco tiam rezultas la faktaĵo, kiun ni nomas ŝtato, popolo, floro, besto aŭ homo. Ili ĉiuj kune obeas al la sama leĝa influo, tamen varianta laŭ-individue. Ĉi tiun leĝecon ekkonis Francé kiel la sep kosmoleĝojn kaj priskribis ĝin en sia granda ĉefverko „Bios, die Gesetze der Welt“. El ĉi tiu ĉefa ideo laŭ certa plano oni facile povas kompreni la tutan abundajn de la vivoformoj laŭ la leĝoj de la grava funkcio: la konstanta selekcio kaj la plejeble granda fortoŝparo,

kaj la abundaĵo laste formas mirindan harmonian cirkon; se oni aplikas ĉiujn ĉi ideojn al la eŭropa kulturo — ankaŭ la kulturo entuta — tiam rezultas unue la egalrajteco de la diversaj kulturoj, kiuj ja ne laŭkaprice estiĝis, sed estas funkcioformoj de la koncernaj landaj, popolaj kaj mediaj cirkonstancoj. Ĉi tiu fundamente nova ideo tuj forigas ĉiujn erarojn de la tutsola kulturvidpunkto kaj estas jam en siaj unuaj konsekvencoj universale efika. Ekkonstruante sur ĉi tiu fundamento oni trovas la rezultojn, ke, se ĉiuj kulturoj egalrajte kune ekzistas (ĉar perforto laŭnature sekvigis nur malfeliĉon, kontraŭstaron, ribelon kaj elradikigon, kion Eŭropo ja je sia propra bedaŭro ekde pli ol 2000 jaroj ĉiam denove spertis pri si mem), estas necese reciproke sin akomodi. Ĉar ĉiuj popoloj kuneloĝantaj en unu kontinento estas devigataj krei al si plej eble oportunan kompromissistemon; tiamaniere ili laste kontentige harmonias, kaj des pli bone, ju pli la individueco estas indulgata.

Do en epoko, kiu la gravecon kaj uzeblecon de ĉi tiu ideo plene ekkonos, oni treege akomodigos, aŭ pli precize, intence efektivigos la jam de pratempo daŭrantajn, sed ĝisnune neklarajn, nekompletajn, kaj per eraraj principoj konfuzitajn provojn. Tiaj provoj ekz. estas la mono, la interŝanĝilo ĉion simpliganta (la aĝiotajon ni rifuzas), unuversala helplingvo, varinterŝanĝo kaj konformigo de la interkomunikaĵoj. Sed ne la absurda transplantado de fremdaj kulturkompreneoj en aliajn landon kaj popolon, la pli-malpli perforta greftado de fremdaj religioj, konstitucioj, vivmanieroj kaj armadoj; ĉar ĝi post pli-malpli longa tempo nur sekvigis la disfalon, dekadencan kaj mortigan malamikecon de la subpremegataj popoloj. Jam la nuraj tuŝoj montras, kiel fundamente sin ŝanĝus kontinento, en kiu oni observus la principojn de la objektiva filozofio; kaj tio estus sendube la forigo de multe da malutiloj, pro kiuj suferegas ĉiuj kulturpopoloj.

La ideo de la „kulturo morgaŭa“ neniel nur tuŝas la eksterajn de ŝtato, sed samgrade la internon. La sama principo koncernanta la interrilatojn inter homo kaj homo, kompreneble devas ekkrei plej idealan laborsistemon, kiu ŝparas fortojn kaj plimultigas la produktaĵojn. Tion, kion en Ameriko Taylor provis, la dum la lastaj jaroj pasie pridisputita „Taylor“-sistemo (urĝas vere eltrovi tute taŭgan labormanieron), trovas ĉi tie ensistemigadon kaj nobligon de la celadoj, kiuj nun per tiaj ekkonoj nivele leviĝas. Dum oni ĝisnune rajte povis diri, ke la „Taylor“-sistemo estas elpensita nur por trouzi la laboriston, la objektiva filozofio provas eltrovi plurajn metodojn havantajn siajn modelojn en la mirinda maniero, kiel la organismoj, precipe la homa korpo mem, solvas la problemon. Ĉi tiu fako de la bioteĥniko, hodiaŭ jam elektita de granda disĉiplaro kiel dumviva okupo, celas nur la laŭsencan aplikon de naturaj procedoj sur la kampo de la civilizo; kaj la miriga sukceso, dum la unuaj jaroj de ilia eltrovo estas, por

tiel diri duonpruvo por la treege praktika valoro de ĉi tiu ideo.

Post la ekkono, ke ĉiuj organismaj laboroj okazas laŭharmonie, oni evitos ĉiun troan ekspluaton konsiderante, ke ĝi post pli-malpli da tempo kaŭzos perturbon de la fortoj: Ĉar unu el la gvidantaj reguloj fundamentaj estas: ke ja la parto devas akomodi sin al la tuto, sed ankaŭ kontraŭe la tuto nur povas prosperi sur la fundamento de la bonstato de siaj elementoj. Ke ĉi tiu ekkono postulas novan etikon — kaj justan, ĉar ja je la bono de ĉiu membro, kaj ĉiukaze estas la vojo de la plej malgranda streĉo — pri tio paroli ni ĉi tie ne disponas pri sufiĉe da spaco kaj tempo.

Mi tamen esperas, ke mi sukcesis iom esti kompreniginta, kiom jam hodiaŭ enhavas la penso pri „kulturo morgaŭa“, kaj kiom da eminentaj perspektivoj sin prezentas en la „Objektiva filozofio“, kiu, volante esti vivo-kaj ordoregularo porĉiutaŭga, la unuan fojon trarompis la sorĉon de nuraj teorioj de en ekstazo al transcendaĵoj fikse rigardanta filozofio.

Konstati la „Pereon de la Okcidento“ nur estas komenco de la kompreno kaj restos senfrukta, se post la dekadenco kaj kadukeco de la „Kulturo hieraŭa“ ne sekvos la „Kulturo morgaŭa“.

G.

NOTO: Pri „Bioteĥniko“ ni pli poste publikigos artikolon. Ankaŭ la problemoj pri „Ligo de Nacioj“ kaj „Eŭropa Federo“ estos pritraktata el la vidpunkto de biologo. (La redakcio).

La religia prasento

De H. Gerke

„Estu lumo!“ dio ordonis laŭ la biblia verkinto de la genezo. Kaj ekestis lumo. Kaj jen—kiaj aliformiĝoj!

La nuda, dezerta, senviva tero interne ekstremis, ekmoviĝis. La lumradioj ĉiuj trafis la koron de la virga tero kiel sagoj de Kupro. Kaj la koro ekbatis, la brusto sin levis, kaj jen la ekvekiĝanta amsopirego plenumiĝis, kaj estis viviĝo tia, kian Faŭsto observis:

Kreemo sur la tuta ter',
organiziĝas er' al er';
kun ter' ĉielo sin aranĝas
kaj orsitelojn interŝanĝas;
ĉielaj fortoj, ho mistero!
sonore vibras en la tero,
en ĉiu universa sfero.

Ĉi tiu momento estis en vero la momento de la ekkreo. Duan fojon ripetiĝis tia kreado. Longa ja estis la vojo de la leviĝo de la kreaĵoj el la stato de la sensenteco. La primitivaj formitaĵoj iom post iom evoluis; kreskaĵoj kaj vivaĵoj signas la vojon.

Sed iutage eksonis denove kreovorto, akre kiel trum-peta fanfaro: „Estu lumo!“ Kaj jen eklumo kvazaŭ ekfulmo falis teren. Ĉifoje ĝi ja ne trafis la teran koron, ne tuŝis ĉiujn la kreaĵojn, sed nur unu saĝeto de la

radioj eniris la koron de unu vivaĵo. Kaj kiam la cetera mondo pluiradis la kutiman vojon, tiam en la tuŝita koro la lumradio ekagadis, kaj denove estiĝis mistera kreemo. El la aroj de la vegetaĵoj kaj animaloj fulmrapide forsaltis la tuŝita estaĵo. Ĝi ne plu vivetis nur mangante aŭ konsumante; sed el la ĝisnuna nura surda sentado naskiĝis, malforta kiel novnaskito, la eksento pri la „mi“-o. Kia mirindaĵo! La tero evoluis al la „mi“-konscio kaj naskis la homecon, kaj nova vivo komenciĝis, multe pli riĉa ol iatempe.

Homo ni nomas la unuan vivaĵon konsciantan pri la propra memstareco interne de la naturo; kaj homoj estas ĉiuj estaĵoj simile sentantaj, egale kiasangaj ili estas. La „mi“-konscio distingas la homon kaj faras ĝin unuaranga estaĵo.

En la embria stato de tiu sentado la vivaĵo similas al novnaskita infano nur surde sentanta pri si mem en la bruada ĥaoso de la ĉirkaŭanta lin mondo. Nur iafoje, kiel vaglumo, la „mi“-konscio ekflamiĝis; ĝi ripetiĝis poste pli kaj pli rapide kaj laste estis seninterrompa, klara, fundamenta sentado: la naturo finpretigis la unuan homon.

Kiel alieca sin montris la mondo al la nova kreaĵo „homo“. Ĝi ne plu estis ĥaoso laŭ bestkompreno, sed la homo perceptis ĝin laŭ si mem—samspeca. Samkiel li estis vivaĵo kun firma volo kaj la intenco ne cedi, tiel ankaŭ la lin ĉirkaŭantaj estaĵoj laŭ lia imago ekvivis, alfrontis lin. La granda homo similis al malgranda infano. Kiel ĉi tiu kredas la objektojn ĉirkaŭe vivantaj, interparolas kun ili divenante iliajn eĉ mutajn respondojn, jen pri ili ĝojas aŭ malĝojas, jen riproĉas kaj timas ilin, tiel ankaŭ la fantazio de la homo vivigis la tutan naturon kaj atribuis ankaŭ al ĝi „mi“-kaj volkonscion. La naturaj objektoj estis aĵoj kiel li kun certaj celadoj. Vivis la ŝtono, sur kiun li puŝis; la dornarbetaĵo gratvundanta lin; la rivero, kiu plaŭdas kaj refreŝigas la soifanton; la minacanta akvoturniĝo; la arbetaĵo kaŝanta lin; la sovaĝaj bestoj, kiujn li timas; la multkoloraj birdoj dezirataj de li; la nubo belege lumanta aŭ mallumege minacanta; la malvarma pluvo; la ventego muĝanta en la praarbaro; la fulmo, kiu zigzagis tra la malluma nubaro aŭ serpentsimile sin terenjetis; la tundra bruado; la ĉielo kaj tero; la suno, luno kaj stelaroj; la agrabla tago kaj malagrabla nokto; la varma someo kaj terura vintro; lumo kaj mallumo; turmentantaj mizeroj kaj entuziasmigaj ĝojoj alvenantaj lin. Ĉio vivis. Kaj kun la objektoj de la naturo kunligis la homon diversspecaj sentadoj: jen de la ĝojo, jen de la malĝojo, jen de la dankemo, jen de la timo. La sentado de ĉi tiu kunligiteco kun la vivaj, jen favoraj, jen malfavoraj fortoj de la naturo, la kredo je viva, aktiva mondo estas la radiko de la religio, kaj la „mi“-konscio la grundo, el kiu ĝi kreskis. Ĝi ne plu forlasis la homon, kien ajn li iris. Ju pli forta emocio ekkaptis lian koron, des pli fortiĝis la religia sentado; kaj kion ajn li travivis, la religio estis fundamentó kaj krono de lia sentado.

Spite al ĉiuj eraroj la prareligio estis interne vereca, ĝi ja estis la certa scio de la prahomo pri si mem kaj la naturo, estis la pramondopiniaro. Do ĉu ni miru pri lia revigo, lia ekstazo? Newton ja ektremis super matematika problemo, kiam li ekkonis la laŭkonjektan solvon, ke la luno rivoluas, ĉar falante kiel ŝtono. Kaj la luno ja nur estas ereto en la nemezurebla mondo de la prahomo.

Grandaj ideoj, malgraŭ elpensajoj de la homa cerbo, estas potencoj memstare ekregantaj ofte eĉ la elpensinton. Same la prareligio. Pli kaj pli ĝi memstarigis, rigidigis, kaj ne malofte eĉ perfortis, konserveme, la kunvivantojn kaj kunkreantojn. Tiamaniere forgesante pri sia origino la religio fortranĉas al si la radikon, el kiu ĝi kreskis. La praopiniaro ne daŭre povas resti la fundamento. La religio evoluu kun la mondopiniaro kaj kongruu al ĝi, aŭ ĝi ne estu; kaj ni favoras la batalon kontraŭ la religioj — pro religio. Ĉar, se la religio estas inspiraĵo, ĝin kreis la mondaj agadpotencoj en la sincera, pura, vereca sentado de la homo; altrudi religion, kie mankas la favora grundo, ne nur estas vane, sed krimo kontraŭ la religio mem. G.

La ekonomia vivo en Germanlando kaj ĝiaj geografiaj fundamentoj

La „rebonigproblemo“ estas solvebla nek per pasieco aŭ sentimentalaj deziroj kaj esperoj, nek per devigo, sed nur per prudento, kiu nek neas, nek malatentas la materiajn kaj psikajn faktojn de la vivo; sed kiu precize konas ilin laŭ origino, forto kaj efiko, kaj kiu estas volema, laŭ tio apliki ilin utile kaj akcepteble por ĉiuj partioj.

Bedaŭrinde la sperto montras, ke multaj, kiuj parolis aŭ skribis pri la „rebonigproblemo“, ne disponas pri la sufiĉa instruiteco, nepre necesa kiel fundamento, por povi juĝi.

Ni pro tio konsideras kiel unu el niaj specialaj taskoj tiun, doni la konojn aŭ montri la fontojn.

Kiel enkondukon en la konojn pri la ekonomio de Germanlando ni rekomendas la verkon „La ekonomia vivo en Germanlando kaj ĝiaj geografiaj fundamentoj.“ Ĝi aperis en la kolekto „Scienco kaj instruiteco“ de la eldonejo „Quelle kaj Meyer“ Leipzig. La aŭtoro, doktoro Kurt Hassert, estas geografi-profesoro ĉe la teknika altlernejo en Dresden. La prezo estas fundamentprezo 1,4 gm. multobligota per la ŝlosilnombro de la „Buchhändler-Börsenverein“ (ligo de germanaj eldonistoj.) La verketo ampleksas 123 paĝojn kun indikoj pri literaturo. Lingvo: germana. Ĝi estas flustile skribita, ŝarĝita per nur malmultaj nombroj, sed kelke da pliaj nombroj estus dezirindaj, por ke oni pli klare povu kompari la cirkonstancojn en la jaro 1913 kun la nuntempaj. Kelkloke la koncepto de la aŭtoro pri la interrilatoj de la popoloj

ŝajnas esti iom malvastigita per la kutima penso pri imperialismo, kvankam la montritaj kaj tuŝitaj mondinter-rilatoj, postulataj pro la speciala situacio kaj formiĝo de Germanlando devus esti gvidinta lin al pli vastaj kaj profundaj pensoj kaj postuloj pri popolinterligo. Jen ni donas resumon pri la enhavo.

Situacio kaj limoj de Germanlando

Lokite en la koro de Eŭropo kaj estante la kernlando de Mezeŭropo, la germana regno pro sia surfaca formo, interna strukturo, kaj pro sia klimato estas transir-kaj per-lando inter la nordo kaj sudo, la oriento kaj okcidento de la kontinento. Ĝi estas ĉirkaŭata de 12 regnoj. Germanlando pro tio estas la plej najbarriĉa lando. En tio kuŝas ĝia forto kaj malforto. Ekzistas nur malmultaj naturaj limoj. En la okcidento kaj sudo facile ireblaj mezaltaj montaroj formas inter si larĝajn vojojn por la trafiko. La orienta limo tute estas senbara.

La germana grundo kaj ĝiaj rilatoj kun la ekonomia vivo

Germanlando ampleksas teritorion, kiu etendas sin de la „Nordaj kalkalpoj“ terase malaltiĝante super la „Germana supra montarlando“, ankaŭ nomata „Alp-antaŭlando“ aŭ „Svaba-Bavara altebenaĵo“, super la sudgermanaj regionoj kaj super la tre formvaria mezgermana montarsojlo, la natura disiga linio inter sud-kaj nordgermanlando, ĝis la nordgermana ebenaĵo kaj bordoj de la „Norda maro“ kaj „Balta maro.“ Pro tio la germana teritorio partoprenas al altaj kaj mezaltaj montaroj, al montetaroj kaj altaj-kaj malaltaj ebenaĵoj kaj montras malgraŭ la, en la ĉefaj trajtoj simpla surfacformo detale tian diversecon, ke ĝi prezentas miksaĵon de montĉenoj, altebenaĵoj, montetaroj, rondvaloj kaj senbaraj ebenaĵoj. Tamen plej ebla alirebleco estas ĉefa karakterizaĵo. Germanlando estas lando de la senbaraj traveturejoj. Ankaŭ la akvostratoj montras la alireblecon kaj traireblecon de Germanlando, kiu kiel fontriĉa lando ankaŭ posedas sufiĉe densan river-reton. La strat-kaj fervoj-konstruadon ankaŭ ne grave malhelpas la surfacformo. La densa loĝanteco kaj la forta evoluo de la ekonomia vivo pro tio igis, konstrui vastajn retojn da ŝoseoj kaj reloj.

La ekonomie aktivaj fortoj de la germana klimato

Pro la geografia situacio inter 49° kaj 55° norda latitudo Germanlando apartenas al la norda meza zono. Ĉi tie okazas la transiro de la oceana klimato de okcidenteŭropo al la kontinenta klimato de orienteŭropo. La nordokcidento de Germanlando havas evidentan oceanan klimaton: mezvarmajn somerojn, mildajn vintrojn, ofte nubkovritan ĉielon, malsekecon kaj nur malgrandajn temperatur-diferencojn dum la jaro. Kontraŭe la orienta

parto de la regno jam montras klare la kontinentan klimaton kun varmegaj someroj kaj malvarmaj vintroj; malpli multe da nuboj kaj malsekeco kaj akraj temperatur-kontrasto. Pro tio oni laŭ la rikolt-rezulto de la okcidento ne certe povas konkludi pri tiuj de la oriento kaj kontraŭe. La plej gravaj klimataj fundamentoj de la ekonomio estas temperaturo kaj pluvo, kiuj en la diversaj partoj de Germanlando estas tre diversaj. La „Rheinvalo“ precipe estas klimato favorita, tiel ke ĉi tie bonege prosperas: rebkulturo, marono, juglando, migdalo, persiko k. t. p. La plej malvarma regiono estas la „Orientprusa lagaro“. La vegetajara periodo, t. e. la infertempoj inter la unuaj terkulturaj laboroj en printempo ĝis la rikolto, estas diverse longaj en la germanaj distriktoj. Ne nur la varmo, sed ankaŭ la lumo havas gravan signifon. La sunbrildaŭro kreskas de la nordo al la sudo kaj de la okcidento al la oriento. Ekzemple Hamburg en unu jaro havas meznombro 130 nebultagojn kaj tagan, meznombro sunbrildaŭron de malpli ol 3¹/₂ horoj. Rilate al la pluvo oni povas nomi Germanlandon malseka lando, kies naturaj akvoj sufiĉas por terkulturo kaj forstkulturo. La pluvo sammezure dispartiĝas tra la tuta jaro; tiel, ke krom esceptoj, ĝenerale neniu monato estas senpluva. La akvoforto en Germanlando estas taksataj je 12 milionoj da ĉevalpovoj; de kiuj sola la monteca sud-kaj mezgermanlando posedas 11 milionojn, kies ekspluaton oni komencis. En „Waldeck“ troviĝas la plej ampleksa eŭropa akvo-fluhaltigilo“, la „Eder-valbarilo, kies basenego enhavas 202,4 milion-cbm da akvo.

En la malalta lando oni povas disponi pri alia naturforfo, la vento kaj la fenomeno de la sammezure kaj periode altiĝanta kaj malaltiĝanta akvo, refluo kaj alfluo; pri kies praktika uzo oni ankoraŭ eksperimentas. (Same en Skotlando kaj ĉe la holanda marbordo.)

La terkulturo

Klimato kaj grundo preskaŭ ĉie permesas la terkulturon, kiu precipe karakterizas la orientan Germanlandon; dum en la okcidenta la industrio superregas. 4% de la tuta areo estas marĉa aŭ nefruktodona grundo. La propra produkto de la terkulturo liveras la bezonaĵon por la tuta popolo dum proksimume 9 monatoj; do granda parto devas esti importata. 1913 Germanlando importis por 2¹/₂ miliardoj da ormarkoj aŭ 600 milionoj da dolaroj grenon, kakaon, kafon, teon, sudfruktojn, grason, oleon k. t. p. Pro klimataj kaŭzoj Germanlando plej multe havas mezbonajn, ofte eĉ malbonajn rikoltojn. Sed la rikoltoj ankoraŭ estas pligrandigeblaj kaj plibonkvalitigeblaj, se oni ĝenerale laboros laŭ la plej novaj sciencaj ekkonoj. ²/₃ de la grundo estas uzataj por la terkulturo. La arbaro okupas ¹/₄ de la regna areo. De la terkultura areo preskaŭ la duono estas posedaĵo de la malgrandaj terkulturistoj, kiuj posedas ĝis 20 hektaroj.

Ĉefe en la sudo, precipe en Virtembergo. En la nordokcidenta Germanlando estas en la plimulto la mez-

grandaj terkulturistoj, posedantaj 20—100 hektarojn. Oriente de la „Elbe“, en la hejmlando de la tiel nomitaj „junkroj“ la grandposedaĵo superregas. La karakterizaĵo de la germana kulturpejzaĝo estas la grenkampo; ĉefe la sekalkampo. Ankaŭ terpomo kaj beto okupas grandan spacon. Krom la terkulturo prosperas la ĝardenkulturo, kiu precipe dum la lastaj jaroj en la ĉirkaŭaĵoj de la grandaj urboj evidente plivastiĝis pro la mizera nutrado. Menciinda ankaŭ estas la fruktukulturo kaj la rebkulturo. En Bavalarlando estas karakteriza la valora lupolkulturo (materialo por biero). La ĉefa komercurbo por lupolo estas Nürnberg, la urbo de la nunjara XVa internacia kongreso de Esperanto.

Brutbredado kaj fiŝkaptado

Germanlando estas unu el la plej gravaj brutbredantaj landoj de Eŭropo. Sed grandkvanta importado de furaĝo estas necesa. Orientfrizlando, Oldenburg, Ŝlesvig-Holstein ĉe la bordo de la „Norda maro“, Alĝau en la Alpoj liveras multvalorajn bovojn. Post Usono Germanlando bredas la plej multajn porkojn. Tamen oni antaŭ la milito ĉiujare importis 90—130.000 porkojn, plej multe el Ruslando, Orientpruslando estas famkonata pro sia ĉevalbredado. Menciinda plie estas la abelbredado kaj la ŝafbredado. Partan anstataŭaĵon por la ne sufiĉa viando prezentas la riverkaj marfiŝkaptado.

Arbar-kaj forstkulturo

La klimato estas favora al la arbaro. En la arbar-disvastiĝo ekzistas grandaj kontraŭoj. La forstkulturo montras plej altan kulturecon. En vastaj regionoj superregas la sama arbspeco, kio donas al la arbaroj certan monotonecon kaj unuformecon. La konifera arbaro estis pli ekonomia. Ĝi ampleksas $\frac{2}{3}$ de la tuta arbar-areaĵo $\frac{1}{3}$ estas foliar-arbaro. Ankaŭ la arbaro ne sufiĉas por la germanaj bezonoj. 1913 oni ekzemple deprenis el la germana arbaro 48 milionojn da cbm. Tamen estis necesa grandkvanta importado, precipe el la arbar-teritorioj de la norda meza zono kaj el la pra-arbaroj de la tropika zono (valoraj lignoj). Sur la ligno en Germanlando baziĝas ampleksa kaj multspeca industrio.

Minekspluato

Ĝis 1914 Germanlando estis la plej grava minekspluatlando de Eŭropo (karbo, fero, zinko, potaso.) Sed ankaŭ tiame jam la fer-kaj zinkprodukto ne sufiĉis. Nuntempe ankoraŭ malpli, post kiam gravaj teritorioj pro la milito estas perditaj. Nun Franclando estas la plej metaliĉa lando de Eŭropo. Petrofontoj ekzistas nur tre malmultaj. Je altvaloraj metaloj Germanlando estas ĉe malpli riĉa. Salo ekzistas grandkvante. Pro tio en Germanlando ekzistas tiom multe da resanigejoj. Ŝtonsalado estas trovebla grandamase; sed la monopolo, kiun Germanlando posedis, estas rompita per tio, ke Elzaso revenis al Franclando. Grava ankoraŭ estas la ekzisto de argilo, sur kiu baziĝas la aluminio-industrio.

Industrio

Ĉar la terkulturo ne tute povas nutri la loĝantaron, la industrio havas plialtigitan valoron. Sed je granda parto la germana industrio estas dependa de la eksterlando. Ĉar kelke da bezonataj krudmaterialoj ne ekzistas sufiĉkvante aŭ tute mankas. Pro tio la estonta politiko de nacia ekonomio precipe devas klopodi, fortigi kaj pli intensigi la terkulturon. Ankaŭ la malgranda meti-industrio devas esti akcelata. Cetere la multspececo de la germana industrio ja estas konata. Ĝiaj ĉefbranĉoj estas: fero, ŝtalo, elektraj materialoj kaj kemiaj produktaĵoj. (Ni pli poste donos detalaĵojn pri la germana industrio.

Enlanda trafiko

Centra situacio, natura irebleco, favora dekliveco maren, ŝipirebleco de la riveroj grave influis la altan evoluon de la germana trafikvivo. La plej granda river-haveno de Eŭropo estas Duisburg-Ruhrort. Hamburg, Berlin, Charlottenburg kaj Mannheim ankaŭ estas tre frekventataj havenoj por river-ŝipado. Laŭ la packontrakto de Versailles ĉiuj germanaj riveroj fariĝis internaciaj, nur ne la Weser (Bremen). La Weser estas la plej malmulte uzata inter la grandaj germanaj riveroj. La plej laborpova germana rivero, krom tio la plej multe uzata kaj kulturhistorie plej grava akvovojo de la tuta Eŭropo estas la Rhein. Post la Rhein la Elbe estas la plej grava germana vojo por la river-ŝipveturado. (Dresden, Magdeburg, Hamburg.) La influ-sfero de la Elbe etendiĝas ĝis Bohemio (Ĉeĥo-Slovakio). Al la river-teritorio nur mankas interna interligo de la okcidento al la oriento kaj de la nordo al la sudo, pri kies plano oni laboras jam delonge. La Eŭropa fervoj-reto estas unu el la plej bonaj kaj densaj. 120 linioj kunligas Germanlandon kun la najbaraj. Pro tio la transito ludas gravan rolon. La „Regna fervojo“ nuntempe estas la plej granda unuforma trafik-entrepreno de la mondo. Oni intencas, anstataŭi karbon per elektro, ĉe kelke da linioj oni jam faris tion. Telegrafo kaj telefono troviĝas en plukonstruo; same la funkstacioj. La grandfunkstacio Naŭen ĉe Berlin havas efikpovon ĝis 20000 km. Teorie oni de tie povas atingi ĉiun lokon de Azio, Afriko, Aŭstralio kaj Ameriko. Sed mankas la permeso de la funktrafiko por la ĝenerala publika servo, kiel en Usono. La transoceanajn kablojn Germanlando perdis per la mondmilito. Je la rekonstruo oni laboras.

Surmara graveco kaj komerca ŝiparo

Germanlando posedas sufiĉe longan marbordon; sed ne favoran situacion rilate al la transoceanaj komerco, ĉar ĝi ne senpere limas al la oceano, sed nur al du duone baritaj apudocenoj, pligrandparte al la Balta Maro, kiu estas fora de la mondfrafiko. Germanlando ĝenerale ne facile estas alirebla demare. La river-enmariĝoj malprofundiĝas, se oni ne konservas la ŝanelon. Elbe-kaj Weser-regiono havas la plej multajn regulajn vaporsip-liniojn. Hamburg

sukcesis, fariĝi apud Antwerpen la plej grava kontinent-haveno en Eŭropo. Kaj post London la plej grava havenloko de nia kontinento; kaj sola peris la duonon de la germana transoceana komerco. (La nuna ŝiptrafiko de Hamburg estis pli granda ol tiu 1913.) Bremen postrestis kontraŭ Hamburg. Antaŭ la milito ĝi estis la plej grava haveno por elmigrantoj. Krom tio ĝi estas grava tenejo por tabako kaj kotono. La glorepoko de la germana komercŝiparo kaj de la germana transoceana komerco pasis por certa daŭro. Por rekonstrui oni fervore laboras. Atentindaj estas la kontraktoj de la plej grandaj germanaj ŝiparanĝejoj „Hamburg-Amerika-Linie“ (Hapag) en Hamburg, kaj „Norddeutscher Lloyd“ en Bremen kun ŝiparanĝejoj en Usono. La scienca instituto por la germanaj maristaferoj estas la germana marobservejo en Hamburg. La komercŝiparo ne estis sekvo de imperialisma politiko, sed la rezulto de natura evoluo.

La germana komerco

De 1891 la importado ne malmulte superis la eksportadon. La bilanco estis kaj estas pasiva. Granda parto de la transoceana komerco iras tra Antwerpen kaj Rotterdam. De 1898 Usono estis la plej grava importlando por Germanlando, dum Germanlando en la Usona importlisto okupis duan, kaj en la eksportado la trian lokon. Ĉar Germanlando estas devigata, importi krudmaterialon el Usono, kontraŭe pretajn produktaĵojn eksporti al Usono, tial Usono por Germanlando estas necesega. Turnite la proporcio ne estas la sama. La pretajn produktaĵojn Usono ankaŭ povas importi el aliaj landoj aŭ mem fabriki. Angllando estis la plej grava aĉetanto. Germanlando eksportis tien pli multe, ol ĝi importis de tie. Antaŭ la milito la germana komerco rapide kreskis. La milito subite ĝin interrompis. Nur malrapide la transoceana komerco reviviĝas.

H.

La ekonomia stato de Germanlando sub la postefikoj de la mondmilito

Per apliko de oficialaj dokumentoj kunmetita de la „Regna Statistikoficejo“. Aperis en lingvoj germana, angla, hispana, itala kaj franca ĉe „Zentralverlag G. m. b. H.“, Berlin W 35.

Ni ĉerpas el ĝi:

Antaŭ la milito Germanlando estis riĉa ŝtato, unu el la plej gravaj aĉetantoj kaj vendantoj sur la mondmilito. Hodiaŭ Germanlando estas ŝtato ne jam refortiginta el la senfortiĝo kaŭzita de kvarjara milito, ŝtato, kiu travivis revolucion kun ĝies ĉiuj konfuzoj, ŝtato, kiu devas toleri la diktaton de detruanta packontrakto.

La kontrakto de Versailles faris el la ruiniĝinta Germanlando landon, al kiu gravaj ekzistobazoj estas forprenitaj. Rilate al amplekso kaj loĝantaro Germanlando estas kripligita; la koloniaj posedaĵoj kaj ceteraj enek-

sterlandaj havaĵoj estas forrabitaj; vastaj kaj valoraj regionoj estas okupitaj de fremdaj trupoj. Transdonante al la kontraŭuloj multajn miliard-objektojn, Germanlando malriĉiĝis; la ekzisto kaj ekonomio senĉese estas ekskutataj pro novaj potencaranĝoj.

Hodiaŭ Germanlando jam nur estas torso. La plej gravaj malgajnoj estas jenaj:

Areo — 13%, loĝantaro — 10, karboj — 26, ferminaĵoj — 75, zinkminaĵoj — 68, tritiko kaj sekalo — 15, terpomoj — 18 kaj komercŝiparo — 89 procentoj.

Kvankam Germanlando eĉ antaŭ la milito ne povis produkti sufiĉe da nutraĵoj, ĝi devis transdoni la plej riĉajn el la regionoj donantaj pliaĵojn.

Kvankam kiel industriŝtato Germanlando urĝe bezonas materialojn, ĝi malgajnis $\frac{1}{4}$ ĝis $\frac{3}{4}$ de la plej gravaj materialoj.

Kvankam bezonanta la mondkomercon, Germanlando devis transdoni senkompense preskaŭ sian tutan ilaron por komerco ekstera, enkalkulite ŝiparo kaj kolonioj.

Ĉirkaŭ 12 milionoj da germanoj, t. e. proksimume la kvinono de la tutlanda loĝantaro, devas suferi fremdan okupadon. Kiel komparo estu menciata, ke Holando aŭ Svedlando havas nur ĉirkaŭ 6 milionojn da enloĝantoj.

La ĉiuspecaj posedvaloraĵoj, kiujn Germanlando ĝis nun devis transdoni al aliaj ŝtatoj sekve de la interkonsento pri batalhalto kaj la kontrakto de Versailles kune kun la ceteraj liveraĵoj, kiujn ĝi plenumis kaŭze de la kontrakto, atingas sumon, kiu jam superas 50 miliardojn da oraj markoj. En tio ne eĉ estas enkalkulitaj la ŝtataj proprajoj en Elzaso-Lotaringio kaj en la germanaj kolonioj kaj la militistaj restaĵoj en ĉiuj malokupitaj regionoj. Ankaŭ la tutan valoron de la privata posedaĵo en la transceditaj regionoj ne entenas la nombro. La kolosa malfortiĝo, tiamaniere kaŭzita al la germana politikekonomio, cifere ne estas plene konstatebla.

Pri la valoro de la regna kaj ŝtata propraĵo en Elzaso-Lotaringio kaj en la kolonioj, kiu laŭ la reguloj de la kontrakto de Versailles ne estos kreditata al la kompensŝuldo, ne ekzistas nombroj, sed estas gigantaj sumoj. Precipe estu dirate, ke pro la nealkalkulo de ĉi-tiuj valoroj ankaŭ ne estas alkalkulataj la fervojoj en Elzaso-Lotaringio, kiujn en 1871 Germanlando aĉetis de Franclando kontraŭ 260 milionoj da ormarkoj enkalkulitaj en la militkompenskonton kaj de tiam plukonstruigis per pluj elspezoj de 713 milionoj da ormarkoj.

Al la kolosa valoro de jam ekzistanta posedaĵo krome aliĝas kun miliard-sumoj la liveraĵoj el la nuna produktado de Germanlando. Parto el la postulitaj liveraĵoj devis esti aĉetata el la eksterlando.

La diverseco kaj la amplekso de la deziroj estas tiel grandaj, ke ne estas eble, citi tutdetale la liveraĵojn. Pro la kuriozeco estu menciata, ke estis postulataj eĉ skatoloj por pedikmortigilo.

La konstantaj pagoj de Germanlando ĝis nun atingas sumon de 2230 milionoj da ormarkoj.

En la detruitaj regionoj de norda Francando kaj Belgando laboradis de novembro 1918 ĝis la 1^a de marto 1920—260 000 en franca kaj 215 000 en angla kaptiteco troviĝantaj germanaj soldatoj, kies laboro estis nek pagita nek kreditita en la riparkonto.

Per la nuraj kontraktaj sinligoj pri riparado kune kun la liveradoj por la rekonstruado de la detruitaj regionoj la sinligoj de Germanlando ne jam estas limigitaj. Inter aliaj devas esti pagataj la okupadkostoj, la elspezoj por la interaliancaj komisionoj k. t. p.

La sumo de 4¹/₂ milionoj da markoj por ĉirkaŭ 4 jaroj, de la 11^a de novembro 1918 ĝis fino de 1922, estas pli alta je 700 milionoj da ormarkoj ol la tutaj armejkostoj de la germana regno dum la jaroj 1910—1913 entute. La kostoj, kiujn Francando dum 1871—1873 devis pagi por la okupado, sumiĝis, ne eĉ ĝis ¹/₁₆ de la nomita sumo. Inter kelkaj aliaj senutilaĵoj por la okupantaj trupoj devis esti aĉetitaj kaj pagitaj: 72 000 porblondvinaj glasoj, 51 000 porruĝvinaj, 15 000 porportvinaj, 45 000 porĉampanvinaj, 58 000 porlikvoraj kaj 26 000 porbieraj glasoj kaj 9 000 vinkarafoj. La transdonado de regionoj, la objektaĵaj kontantaj liveraĵoj suferigas la germanan politik-ekonomion.

La nutrajprovizado tre ege endanĝeriĝis, ĉar precipe la ekonomie plej produktoriĉaj regionoj devis esti transdonataj. La fruktoportanta tero kaj la nombro da brutoj malpliĝis pligrand-proporcioje ol la nombro de la loĝantaro.

Malgraŭ la malgajno de la Elizasa minejo kalio ankoraŭ ekzistas sufiĉkvante. Kontraŭ tio la provizado je la ceteraj sterkoj estas malfavora kaj ne respondas al la bezono. Pleje rimarkebligas la manko de fosfatenhavaj sterkoj. Tiu-ĉi manko havas — ankaŭ se la priazota problemo kontentige estus solvebla — decidigan gravecon por la produktkapableco de la germana ekonomio. La mankon de tiuj-ĉi sterkoj unua-vice kaŭzis la malgajno de la produktado de „Thomas“-ŝlako, ebligita per la lotaringaj mineto-minaĵoj.

Ankaŭ la brutmastrumado grave malprofitis laŭ liverpovo, ĉar pro la malpliigita aĉetpovo ne plu povas esti importataj sufiĉe da fortignutraĵoj.

Germanlando hodiaŭ disponas laŭ proporcio de la nombro de al ĝi restintaj loĝantoj pri treege pli malgranda nutro-bazo. Tial ĝi pli urĝe ol antaŭ la milito bezonas importon de nutraĵoj kaj devas pliiĝi la industrian funkciadon.

Sed la materialo-bazo por la germana industrio estas samgrade malfortiginta. La produktaĵo da krudfero kaj krudŝtalo sumiĝis en 1920 nur ĝis ĉirkaŭ la duono de tiu en 1913, tiu de krudzinko nur ĝis ¹/₁₆ de tiu en 1913, tiu de krudplumbo ĝis ĉirkaŭ ¹/₃ ĝis ¹/₄ de tiu en 1913.

Tiaj ankaŭ estas la cirkonstancoj pri karboj. Antaŭ la milito la germana karbeksporto egalas la valoron de la tuta germana importado de feraj, manganaj, zinkaj, plumbaj kaj kupraj minaĵoj. Hodiaŭ Germanlando devas importi karbojn. Per la okupo de la Ruhr-regiono la karbo-provizado estas tute paralizita.

Tio estas por la loĝantaro eksterordinare malfavora. Ĉar kontraŭe al multaj aliaj ŝtatoj, precipe Francando, Britlando kaj Usono, la ekonomia situacio de Germanlando estas bazita malpli sur naturaj riĉaĵoj de la tero aŭ de la kolonioj, sed sur la laborpovo de sia loĝantaro. La malgajno de industriaj laboristoj, kaŭzita de la regiontransdonoj atingis (laŭ konstato en 1907) nombron de 805 000 laborantaj personoj. Tiu-ĉi malgajno estas ĉirkaŭ samgranda kiel la tuta laboranta loĝantaro de la landoj svisa (822 000), holanda (783 000) aŭ ankaŭ sveda kaj norvega (565 000 + 241 000). Ĉirkaŭ 2 milionoj da plej sanaj, plej fortaj kaj plej laborpovaj viroj batalmortis dum la milito; pli ol 1¹/₂ milionoj ricevis en la milito tiajn korpajn difektojn, ke ilia laborpovo estas malhelpita. Militepidemioj kaj malsatadoj pro blokadoj plimalfortigis la homojn.

La germana pagbilanco, antaŭe aktiva, tiamaniere fariĝis pasiva. La importo je multo pli superas la eksporton ol antaŭ la milito. La tutspezo ankaŭ malpligrandiĝis.

En la jaro 1913 ĉe komercbilanca pasivo da 0,7 miliardoj da ormarkoj sin montris pliaĵo de ĉirkaŭ 1 miliardo da markoj en la pagbilanco. Dum la milito estiĝis pasivo de ĉirkaŭ 15 miliardoj da ormarkoj. Tiu-ĉi pasivo povis esti forigata nur per ĉerpo el la kapitalposedaĵo kaj per prunteprenoj el la eksterlando. De 1919 ĝis 1922 sin montras nova pasivo da 14 miliardoj.

La pasiveco de la pagbilanco estas la pli profunda kaŭzo de la ruinigo de la germana valuto. La konfuzado de la mastrumada bilanco kaj la troa monbilpresado ree estas la sekvoj de la mon-senvalorigo. Ĉiujn fincopolitikaĵn kontraŭrimedojn postulas la eksteraj ŝuldpagoj. La senĉesa prezplialtiĝo ŝajnigas ekonomian floradon, kiu kredigas la supraĵe observantan, ke Germanlando resaniĝis. Sed la konscienca observanto baldaŭ ekkonos, ke la plimulto de la loĝantaro enmizeriĝis. Ekzemple por la jaro 1921 sin montris manko de viando da 32,5 % kompare al 1913. La konsumado de porpana greno malpliĝis je 27 %, de terpomoj je 51 %, de kafo je 30 % (En Francando ĝi estas pli granda je ¹/₅, en Usono je pli ol ¹/₃ de biero je pli ol 60 %). Konforme al tio ankaŭ la importo de luksaĵoj. Da loĝejoj mankas en Germanlando ĉirkaŭ 2 000 000.

La salajroj konstante plimalaltiĝas. La pagoj por la spertaj laboristoj, mezaj kaj superaj oficistoj ĉiam pli tendencas, malaltiĝi ĝis la salajro de la plej malalte pagitaj laboristoj. Ekzemple en 1913 lerninta fraŭla metallaboristo ĉiusemajne perlaboris 12,70 markojn pli ol la nelerninta, sed en 1922 jam nur 1,93 ormarkojn. La diferenco do malpliĝis de 53,9 % ĝis 9,4 %. La supera ŝtata oficisto perlaboris en 1913 ĉiumonate 443 orajn markojn pli ol la suboficisto, sed en 1922 nur 99 orajn markojn. La diferenco en 1913 atingis 269 %, en 1922 nur 96 %. Komparante la diversajn ŝtatojn laŭ la interna aĉetpovo, oni spertas, ke la germanaj laboristo

kaj oficisto povas konsumi preskaŭ nur la duonon de tio, pri kio disponas la sviso, holandano, norvego k. t. p. Laŭ tio simpla soldato de la interaliancaj komisionoj enspezas pli ol germana regna ministro. Eĉ pli grave ol la perlaboraj enspezoj la perkapitalaj enspezoj malpli grandigis. La perrentaj enspezoj preskaŭ nuliĝis.

La dividendpagoj ankaŭ malpli altiĝis. Ili sumiĝas kalkulitaj laŭ orvaloro ne eĉ ĝis $\frac{1}{50}$ de tiuj en la antaŭmilita tempo.

La industrikapitalo ankaŭ malkreskis. Dum ke la tiama kapitalo laŭ la kurzo de la 31^a de decembro 1913 ampleksis 17,4 miliardojn da markoj, la sumo de ĉiuj akcioj je fino de 1922 jam nur havis privatekonomian valoron de 4,9 miliardoj da ormarkoj. Tiu-ĉi malplio kaŭzas, ke Germanlando ne estas kapabla, malebligi tro malaltprezan forvendon de la industriaĵoj.

La intelekta klerigo estas daŭrigebla nur tre malfacile kaj limigite. Multaj germanoj eĉ ne plu povas aboni tagjurnalon. La nombro de la konstantaj aĉetantoj de ĵurnaloj daŭre malkreskas. De la 1^a de januaro 1921 ĝis la 1^a de decembro 1922 ĉesis aperi 243 germanaj ĵurnaloj, 89 kunfandiĝis kun aliaj, 167 treege limigis sian amplekson.

Mizerega estas la situacio de la scienco. La studentoj estas devigataj, havigi al si la plej grandan parton de siaj porvivaj bezonaĵoj per kroma laboro, kiu oftfoje fariĝas ĉefa laboro.

La sanstato malfavoregiĝis. Suĉinfanoj plimultnombro mortas. En Pruslando dum la unuaj 9 monatoj de 1922 mortis pro tuberklozo pli ol dum la tuta antaŭa jaro. La germanaj institutoj por malsanuloj kaj flegado dum jaroj povis nek renovigi siajn havaĵojn, nek okazigi necesajn riparojn.

En la en-kaj eksterlando disvastiĝis senbazaj imagoj pri la financaranĝo de la germana regnoadministrado. Por la regula interna administrado de la regno estas uzata nur tre malgranda parto el la elspezoj de la interna etato aŭ eĉ de la tuta etato.

La plimulton konsumas la pagoj al la Entente, pli ol $\frac{2}{3}$ de la tutelspezoj kaj multe pli ol la tutaj elspezoj de la regno en antaŭmilitaj tempoj. El la nunaj internaj elspezoj la plej alta sumo estas por la procentpago por la regna ŝuldo.

Tre malgrandaj estas la elspezoj por la militdifektitoj kaj por la postlasitoj de la militmortintoj.

La tutaj elspezoj por armeo kaj marino estas nur $\frac{1}{15}$ de tiuj en la antaŭmilita tempo.

La elspezojn por la polico pagis antaŭ la milito la landoj kaj komunumoj, ankaŭ nun ili estas nur malgravaj en la regna etato.

La elspezoj por ekonomio kaj kulturo plej grandparte estas por enspezdonaj aranĝaĵoj ekonomiaj. De post la kontrakto de Versailles la regno principe ne komencis novajn komunajn laborojn, sed nur pretkonstruis komecitajn, per kies halto, la tutaj antaŭaj elspezoj estus vanaj.

La kvanto de la socialaj ŝarĝoj pliiĝis. Tamen ne estas pretendataj gravaj sumoj.

Oni provas, krom per tarifplialtigoj forigi la deficiton de la poŝto kaj fervojo per malplimultigo de oficistoj, (de la 1^a de oktobro 1921 ĝis 1^a de novembro 1922 oni jam maldungis 25 000 personojn) per moderigo de malprofitaj mastrumejoj kamparaj kaj per plisimpligo de la urbaj, precipe per homŝparo pere de maŝinoj, kiel ankaŭ per reformigo de la administrado. La elspezoj por la financ-kaj impostadministradoj plialtiĝis ĝis iom pli ol la duoblo de tiuj en 1914, sed oni devas konsideri, ke antaŭ la milito la regno ne posedis regulan financ-administradon.

La elspezoj por la financadministrado estis dum la jaro 1920—21 ne pli ol 3% de la enspezoj.

La kostoj por la regula administrado sumiĝas nur ĝis 2,1% de la tutaj elspezoj de la regno, certe necesaj. La imposto por posedaĵo, trafiko kaj konsumo estas pli granda ol en eksterlando kaj pro tio malfacile efektivebla.

Oni celadis senprokrastan pagon de la impostoj.

Ankaŭ la eksterlando suferas pro la kontrakto de Versailles. La ekenomia evoluo antaŭmilita estis karakteriza por la pliiĝantaj interrilatoj formantaj komunan tutmondekonomion, kiu nun estas detruita.

Germanlando estis sur la mondmerkato grava aĉetanto, ĉar ĝi ankaŭ povis vendi multe.

La spezo de la ekstera komerco ankaŭ en la jaro 1922 ne atingis la duonon de tiu en la jaro 1913.

La importo malaltiĝis laŭ valoro je 45%, la eksporto je 62%.

Sekve de tio ankaŭ malpligrandiĝis la tutmonda komerco kaj tiamaniere la senlaboreco preskaŭ ĉie kreskis.

Tiu-ĉi sur 56 inkvartpaĝoj troviĝantaj asertoj estas pruvataj per multaj ciferoj kaj atestataj de multnombraj, interesaj priskriboj. Ĉiu, kiu intencas, okupi sin pri la problemo de la laŭkontraktaj sinligoj aŭ pri la plenumkapableco de Germanlando, devas ekzameni la cititajn dokumentojn. Pli poste ni skribos pli multe pri tiu-ĉi temo. Ni petas, antaŭe legi la sekvantan artikolon.

B.

Germana propono pri riparadoj

Alphons Horten, politike eble centrumano, iama direktoro en la „Thyssen-Werke“, nuna urba konstrukonsilanto en Berlin, estrarano de — „Bund Neues Vaterland, Liga für Menschenrechte, deutscher Zweig“ (Unuiĝo Nova Patrolando, Ligo por homaj rajtoj, germana grupo), radikalpacifista organizaĵo laboranta vigle por Ligo de Nacioj kaj interkonsentiĝo kun Francio — transdonis al ni privatan memorskribaĵon sub la titolo „Die neuen französischen Vorschläge zur Lösung des Reparationsproblems und ein deutscher Gegenvorschlag dazu“. (La novaj francaj proponoj pri solvo de la riparadproblemo kaj reciproka propono germana).

Jen la plej grava el la enhavo:

Horten konfirmas, ke preskaŭ la tuta publika opinio en Germanio treege estas trompata per tendencaj sciigoj de la gazetoj subtenataj el la ĝeneralaj kostoj de la grandindustrio (Laŭ nia opinio la samo okazas sur la alia flanko. La gazetproblemo estas tiom grava, ke ni iam poste reatentigos pri ĝi kaj esploros la staton (Red.)

Plue Horten ankaŭ supozas, ke la germana grandindustrio pere de la eksporto grandamase sendis kapitalojn kaj valorojn eksterlanden, ke la ferindustrio pli kaj pli reduktas la salajrkvoton de la produktajo.

Horten kontraŭdiras, ke ĉiuj pretendoj de Francio estas pravaj, ekz. pri pago de pensioj; li rifuzas, ke Germanio estu responda koncerne sumojn, kiuj el la ĝisnuna franca rekonstrulaboro pro mankhava administrado riĉe utilis al perantaj komercistoj, kaŝkomercistoj kaj procenteguloj.

Li deziras, ke la demando, ĉu la ĝisnunaj pagoj de Germanio sufiĉis, aŭ ne, eksiĝu el la diskuto. Oni trovu la germanan povon, por laŭ ĝi mezuri, kiom da mono Germanio ĉe pleja streĉo pagu dum la venontaj jaroj. Grave estas trovi la proporciojn inter la tutaj franca kaj germana povoj kaj kiom da iliaj naciaj havaĵoj ambaŭ landoj perdis de 1914. Nur tio ilustras, kiom oni prave povas postuli, ke Germanio pagu, kaj kiom pagi ĝi estas kapabla (ankaŭ laŭ nia opinio la sola kaj racia vojo al plibonigo (Red.)

Certe estas la materiaj difektoj en Francio multe pli grandaj ol en Germanio. Ne tuŝataj estu la homperdoj ambaŭflankaj per la milito kaj ĝiaj sekvoj. Ili atingis, nur militiste, t. e. ne kalkulite la perdojn pro malsato sekve de la blokado, laŭ la oficialaj statistikoj 1,792 milionojn da mortintoj en Germanio, 1,828 milionojn en Francio.

Grave estas unue elkalkuli la tutajn iamajn havaĵojn de la ambaŭ landoj, precipe de Germanio.

Antaŭ la milito ambaŭ verŝajne estis egalaj kaj sumiĝis ĝis po 300 miliardoj da ormarkoj. La franca havaĵo malgraŭ la anekso de novaj teritorioj sendube tre malgrandiĝis. Ne konsiderante la dummilitan ŝuldiĝon eksterlandan oni povas taksii havaĵperdon da maksimume $\frac{1}{3}$, do la hodiaŭan francan havaĵon ni povas taksii je 200 miliardoj da ormarkoj. Laŭ tio la havaĵo po persono estis en Francio antaŭ la milito mezkvante 300 miliardoj dividite per 40 milionoj = 7500 ormarkoj, kaj hodiaŭ eble malpliĝis ĝis 5000 ormarkoj (200 miliardoj: 40 milionoj).

Sed la hodiaŭa germana havaĵo, nur ankoraŭ ĉ. 50 miliardoj, do estas po persono anstataŭ 300 miliardoj dividite per 60 milionoj = 5000 ormarkoj nur ankoraŭ 50 miliardoj: 60 milionoj = proksimume 850 ormarkoj. Do la franca popolo plimalriĉiĝis $\frac{1}{3}$, kaj ĝia posedaĵo nun estas 66% de la antaŭmilita; sed la germana posedaĵo malpliĝis ĝis 17% de la antaŭa. Eble 30 miliardoj

transigitaj eksterlanden. La ruiniĝo estas multoble pli granda ol en Francio.

Ĉe pritrakto de la riparproblemo estu rifuzata laŭprincipe bazi ĝin sur la utopia Londona diktato. Ne ia arbitre fiksita sumo povas esti fundamento, sed tutsole la fakta povo, la fakta germana havaĵo. Krome necesas postuli, ke laŭ tio estu fiksota tutsumo de ĉiuj germanaj ŝuldoj. Ĝis kiam Francio laŭ tio ne agadas, ĝi ne refutas la aserton, ke ĝi intencas detrui Germanion.

Unue ja Germanio resaniĝu, nur tiam ĝi povas pagi.

Fontoj, el kiuj oni ĉe raciaj pretendoj povos ĉerpi la rimedojn por ripari, estas la grandaj eksportprofitoj kaj la malaltaj salajroj bazantaj ambaŭ sur la germana malbonvaluto (atentu ankaŭ lian artikolan: La pagigo el la realaĵoj). Reorganizado de la ŝtataj financoj per prezredukto estas necesa. Ĉar kompare al la enlanda orvaloro la salajroj de la ŝtataj laboristoj nur estas $\frac{1}{2}$, la salajroj de la oficistoj nur $\frac{1}{3}$ ĝis $\frac{1}{6}$ de la salajroj antaŭmilitaj, do certe estus eble forigi la deficiton en la ŝtata kaso kaj rezultigi plion. Ordigon de la financoj malebligas la senmezura impost-defraŭdo kaj la elrabado de la popolo kaj precipe de la regno per monopoloj kaj sindikatoj. Pro tio estas necese meti sub kontrolon de la societo, kontraŭ sufiĉa kompenso al la posedinto, 15% de porvivo-necesaj ŝlosilindustrioj kaj 10% de la terkultur-areaĵo.

Krome estu fiksota eksport-limimposto je 50% de la diferenco inter la produktado-kaj eksterlandaj vendokostoj.

Tiamaniere oni povos enspezi el la eksportprofito poĵare 1—2 miliardojn da ormarkoj (La interesan detalan elkalkulon ni ĉi tie preterlasas (Red.).

Per realigo de ĉi tiuj du postuloj oni povos pagi al la Entente dum 12 jaroj 30 miliardojn da ormarkoj, duone per mono, duone per realaĵoj.

La Ruhr-okupado estas firme kunligita kun la riparadproblemo; pri ĝi ni diras jenon.

Francio okupadis la Ruhr-regionon pro tri klare ekkoneblaj kaŭzoj:

a) laŭ instigo flanke de la franca ferindustrio, kiu celas aligi kaj ekonomie submeti al si la germanan Ruhr karbindustrion, pro la propra karbobezono;

b) por havigi al si el la germana grandindustrio — nur ĝin la franca registaro prave ekkonis pagkapabla — karbonon kaj koakson aŭ monon, do la rimedojn, kiujn la germana registaro, senforta kontraŭ la ferindustrio, ne povas havigi al ĝi, por tiamaniere malhelpi la ekonomian ruiniĝon de Francio;

c) por okupi la centron de la armilindustrio kaj esti sekura kontraŭ atako de Germanio.

Kaj la sukceso? La provo, perforte asociiĝi al la germana ferindustrio, aŭ pli ĝuste, ekonomie submeti al si la germanan industrion, tute malsukcesis — laŭsupoze. La malo okazis: La franca industrio jam estis malforta pro la ĝisnuna malgajno, kaj nun la manko de koakso treege vundis ĝin; dum la germana per siaj grandaj profitoj estas interne firma kaj eble venkos la konkuranton,

al kiu, se la konflikto daŭrados, minacos parte mem fariĝi dependa al la germana industrio.

Grandaj pagoj, ĉu monaj, ĉu materialaj, ne estas eldevigitaj kaj ankaŭ estonte ne estos verŝajnaj. Eĉ se oni iafoje eldevigos grandan karbtransporton, tamen regula koakstransporto, kaj tia estus necesa, ĉiukaze estas malebla, ĉar la germanoj malfunkciigos la koaksforojn.

La celata ekonomia rezulto do ne realiĝos, kontraŭe Francio ŝarĝos sin per reaj grandaj elspezoj, kiuj renversos la ŝanceliĝantan ŝtatkrediton. Per la Ruhr-aventuro Francio elvokis al si similan sorton, kiu Germanion jam trafis — per kies kulpo, ni ĉi tie ne esploru. — La Ruhr-okupado memkompreneble plue konstante malpliigos la germanan posedaĵon, kaj la pagpovo do daŭre malkreskas (ne kalkulite la kreskanta antipatio de la turmentita popolo).

En Francio oni konfesu la eraron kaj penadu sincere kaj kuraĝe korekti ĝin. Al la soldatarismo oni malebligu la agadon. Tiam estos veninta la tempo interkonsenti kun Francio (en Germanio estis kaj estas sufiĉe da bonvolo.) (Red.)

G.

La germanaj fervojoj 1910—1920

La presoficejo de la regna ministro por trafiko sendis al ni jenon:

La regna ministro por trafiko eldonis en la lasta tempo sub la titolo „Die deutschen Eisenbahnen 1910/1920“ (La germanaj fervojoj 1910/1920) verkon priskribantan la laborojn de la germanaj fervojoj dum la lasta jardeko de la ŝtata fervojaro, kiun anstataŭis la 1. aprilo la Regna Fervojaro. La libro komencas aliĝante al la raportoj, kiujn siatempe eldonis la prusaj ministroj por komuna laboro kaj administrado en Prusio en la jaroj 1890/1910 kaj 1900/1910. Ĉi tiuj raportoj ampleksas la tutaĵon de la komunaj laboroj, do ankaŭ krom la fervojoj la konstru-administradon; la nuna verko temas nur pri la fervojoj, sed krom la prusaj-hesaj ankaŭ pri la ŝtatformoj de la ceteraj germanaj landoj, la privataj kaj la duagradaj fervojoj de la tuta Germanio. Estas almetita kiel aldono priskribo pri la iama regna fervojo en Elzaso-Lotaringio ekde ĝia ekposedo flanke de la regno gis la redono al Francio.

La priskribo koncernas la bonegan pliperfektigon de la germana fervoja servo antaŭ la milito, la militjarojn 1914/1918 kaj la ambaŭ unuajn jarojn post la packontrakto. La plej ampleksa parto da ĝi temas pri la laborkvanto de la fervojoj dum la milito. Post mallonga skizanta enkonduko sekvas 10 ĉapitroj pri amplekso de la fervojaro kaj fervojkonstruo, organizo kaj administrado, personarferoj, trafiko kaj servado, tarif-feroj, provizado, maŝintehnika fako, financaj aferoj, privataj kaj duagradaj fervojoj. En 28 aneksaĵoj estas aranĝita per tabeloj la statistika dokumentaro de la priskribo. La presaĵo estas

ornamita per granda kvanto la ilustraĵoj. Almetita estas ĉefa plano de la germanaj fervojoj laŭ la stato je la 1. aprilo.

Laŭ ĝeneralaj oficialaj dokumentoj la laborego de la germanaj fervojoj dum la milito estas priskribita tute. Post la bonega sukceso de la mobilizado senĉese prezentis sin al la forvojistoj novaj taskoj. Ni sciigas, kiamaniere ili sukcesis estri ĉiujn malfacilaĵojn en la funkciado kaj interkomunikado, konservi laŭordan funkciadon ankaŭ por la civila trafiko kaj krome kontentigi, kompreneble unuavice, ĉiujn postulojn de la armea administrado. Rilate al la tarifpolitiko la germanaj ŝtataj fervojoj ĉefe celis akceli la turismon kaj varinterŝanĝon en la per la blokado soligita lando kaj pro tio malpli atentis la financojn. Nur en la du lastaj militjaroj, kiam la elspezoj ĉiam kreskadis kaj la enspezoj ne plu sekvis la pliigon, la fervojoj decidiĝis plialtigi la transportkostojn.

En la enkonduko estas dirate, ke la regna ministro por trafiko opinias honora devo, por memori la posteularon, starigi al la germanaj fervojoj per ĉi tiu libro monumenton, en kiu estas priskribitaj iliaj laboroj ankaŭ en ĉi tiuj malfeliĉegaj tempoj. Ankaŭ dum ĉi tiu elprova tempo la germana ŝtata fervojpolitiko sin montris bonege fidinda. Ne estis kulpo de la fervojoj, sed sekvo de la politika stato post fino de la milito kaj eksplodo de la revolucio, ke ankaŭ la ŝtatformoj je la fino de la jaro 1918 trafis la katastrofo. La du sekvintaj jaroj ne sufiĉis, por restarigi la fundamente ekskuitan konstruaĵon, kaj al la administracio restis la malfacila tasko, iom post iom relevi la germanajn fervojojn al la antaŭmilita stato.

G.

Neniam plu milito

De *Auguste Kirchhoff*

(Internacia Virina Ligo por paco kaj libereco)

Parolita 27. julio en Bremen dum la Neniam-plu-milito-demonstracio, kiun la pacifistaj socioj okazigis kune kun kelkaj aliaj kulturorganizaĵoj kaj la laboristaj unuiĝoj.

La trian fojon estas la datreveno de la tago, kiam en ĉiuj kulturlandoj de la mondo la amikoj de la paco, la pacifistoj, socialistoj, la virinoj kaj patrinoj, — ĉiuj, kiuj pro moralaj-religiaj, etikaj kaj ekonomiaj motivoj — kiuj, ĉar ili estas homoj, ĵuris „militon al la milito“ pasie protestas. De jaro al jaro tio estas pli urĝa, pli necesega.

Pli premegante ol iam pezas la militemo sur la febranta mondo. Se la registaroj kaj diplomatoj ne baldaŭ ŝanĝos sian politikon, se la popoloj plue ne malaprobos ĝin, ni sensave eniros novan mondmiliton, kiu estos granda, sovaĝa amasa murdado sur, sub, super akvo kaj tero, ekstermado, kontraŭ kiuj ĉiu ĉagrenego kaj mizerego de la pasintaj longaj teruraj jaroj, kiujn ni devis travivi, estas infanludo.

El elektre direktataj aerŝipoj, kiuj ne plu bezonas homan manon, kiuj rapidege kuregas, memfunkciante krev-

antaj venenbomboj elverŝos sian mortigan pluvon sur florantajn urbojn kaj riĉegajn kamparojn ekstermante dum momentoj ĉion, kio vivas.

Kion mi diras, tio nepre ne estas produktaĵo de malsana fantazio, sed estas vera, bruta realaĵo. Antaŭ nelonge ĉi tiuj miraklaĵoj de la moderna tekniko, la abomenaj pruviloj de homa senkultureco sukcese pasis la provon. Sur la aviadil-flugejo de Villes auvage ĉe Parizo okazis laŭ la angla gazeto „Neniam plu milito“ antaŭ ŝtataj subsekretarioj kaj ministroj la provoflugo, kiun la gazetaro juĝas plensukcesa.

Do, la gloro de unu lando ne lasos ripozi la alian. Al la internacia armadkonkuro, kies sekvo estis la mondmilito 1914—1918, al la naskokonkuro, kiun la soldatarismo predikis al la virinoj kiel „patriotan devon“, aliĝas la internacia vetertrovado. Dio malhelpu, ke la mondo tiaĵon elpensadu kaj gardu niajn infanojn kontraŭ heroa morto en venontaj militoj!

Sed kion pri tio diru virinoj kaj patrinoj. Ĉu ne ribelas en ni la plej bona kaj plej profunda sento kontraŭ ĉi tiu krima frenezo? nia patrineco volanta vivon doni, konservi kaj florigi? Maximilian Gorki foje diras en delikata malgranda novelo: „Patrino ĉiam estas malamikino de la morto, kaj la mano portanta la morton en la domojn de la homoj estas malamata de ĉiuj patrinoj kaj malamika. Ĉu ni virinoj volas kaj rajtas doni al la mondo infanojn, por ke ili en la kulmino de la vivo estu transdonataj al la plej terura morto — por ke oni en la nomo de la patriotismo eduku ilin murdistoj? Ho ke ni virinoj ja kuraĝus sekvi nur al la propra konvinko, aŭskulti la voĉon klare sonanta en nia koro.

„Pli da respekton kontraŭ la sankta homvivo!“

Kiu igas nin paroli nian sanktan „ne“, kiam la viro ĉiam en nekomprenebla indeco ĉiam denove ekkaptas la armilon kiel la plej saĝan lastan decidilon. Ne sukcese ni dum 4 longaj jaroj prenis sur niajn ŝultrojn ĉiun doloron de la mondo; estas ĉiutage krucumita nia patrineco; nia patrineco eliris purigita: ĝi volas doni al la lando, kiun ĝi amas el tuta sia animo, filojn, kiuj por sia patrujo vivu kaj laboru, sed ne mortu!

Pli minace ol iam antaŭe pezas la militemo antaŭ ĉio sur nia mortmalsana Germanio. Homvivo ne plu estas sankta interne de niaj limoj; la politika kontraŭulo, la popolano apartenanta al alia „raso“, estas sensirma, ekster juro. Forigi lin laŭdas la sankta femo de la 20^a jarcento, certaj sekretaj organizaĵoj, kiel porpatrujan heroaĵon. „Faŝismo“ kaj „hokkrucismo“, kio alia ili estas ol bedaŭrindaj infanoj de ĉi tiu militemo. Kio alia ol floroj de malsaĝa, neniel pravigita aroganteco aljuĝanta nur al la propra konvinko, la propra raso, la propra lando ekzistrajton kaj valoron? Kaj tamen la hodiaŭa homaro vivanta en la tempo de l'trafiko devus scii: Samkiel en la propra koro loĝas kune bono kaj malbono, tiel ĝi vidas la grandan riveron de la homa kulturo, homa boneco kaj grandeco fluantan tra ĉiuj landoj, ĉiuj tempoj,

— se ĝi nur volas vidi. Kaj ankaŭ tio alia estas certa: Konvinkojn oni ne mortigas perforte. Kontraue: el malliberejo kaj tombo ili eliradas despli venkinta, honorinda.

Do ankaŭ ĉi tie estas nia devizo:

„For la batalilojn!“

En ĉiuj aliaj landoj celas nia „Neniam-plu-milito-demonstracio la ĝeneralan militistan malarmadon. Mi ja neniel asertas, ke ĉi tiu problemo en nia patrolando tute estas solvita. Tamen Germanio rilate al tio multe antaŭiĝis kontraŭe al la aliaj landoj konstante preparantaj sin por nova milito. Kaj nia moto ja devus teksti „malarmado!“ sed „morala malarmado.“ Venĝi malbonon per malbono, perforton per pli da perforto kaj tiamaniere pliamasigi la multe da malbono ĝis lavango, estis la ĝisnuna metodo de la popoloj, la metodo de la nura egoismo, kies sukceso videbla al ĉiu okulo estas, ke la tuta mondo hodiaŭ estas ruĝigita ekonomie kaj morale. Konsiderante ĉi tiun certe ne edifan sukceson, ĉu ni ne prefere komencu la aferon laŭ renversa ordo?

Kiu, ĉar la franca Ruhr-aventuro ne nur suferigas nin ĉiujn sed estos vangfrapo al la mondpaco, ekpensas, kontraŭmiliti ĝin, ĉu en gerilo, ĉu en estonta revenĝomilito, tiu pekas kontraŭ sia patrujo, ne kalkulte nia pacifista vidpunkto; eĉ la plej pasia militemulo devas ekkono, ke la batalejo de ĉi tiu milito, en kiu ni devus militi kontraŭ milfoje superanta nin militpotenco, estus nia propra lando. Kaj unu rigardo al la ruinaĵoj de Nordfrancio devus montri al ni la sekvojn.

La ruinaĵoj de Nordfrancio — jen la punkto, ĉe kiu tiu kontraŭa metodo komencu, per kiu ni eble povus pli homindece liberigi nian patrolandon de la tremda regado kaj alporti konstruĝojn por la mondpaco. Kiom longtempe ĉi tiuj ruinaĵoj priatestas pri la barbara detruemo, tiom longe vera paco ne estas ebla. Ni do uzu la hodiaŭan tagon, kiu ja estas tago de la mempeniĝo, varbi ĉe niaj popoloj pri memvola ofero por rekonstrui Nordfrancion. Certe, nia germana popolo fariĝis malriĉega, ne kalkulte tiuj, kiuj, kiel en ĉiuj landoj sin pliriĉigas kaj grasigas per la malfeliĉego kaj mizero. Sed tiom malriĉaj ni ne jam estas, ke ne io estus restinta al ni por oferi, se ni per tio anstataŭ kurkonkuro celanta malbonon, anstataŭ kontraŭagoj kaj revenĝrimedoj povus estigi konkuron pro la bono kaj tiamaniere krei atmosferon inter Francio kaj Germanio, por povi intertrakti. Edzinoj kaj patrinoj, vi oferas al la milito ne nur havaĵon kaj posedaĵon, juvelojn kaj oron; vi oferas multe pli valoran; la vivon de viaj edzoj, viaj filoj — kaj multaj el vi estis fieraj pri via oferemo. Ankaŭ hodiaŭ vokas la patrolando, vokas la mondo. Ne sangoferon, nur memvolan pacdonigan oferon donu. Kaj se ĝi ne tuj videble sukcesus; ni virinoj kaj edzinoj scias: nenia faro neniĝos en la mondo. Kaj kiel el malbona semacoj elkreskas fruktaĵoj kiel potencoj de la malamo kaj venĝemo malkonstruas kaj detruas, tiel el la paciĝemo kaj oferemo naskiĝos la potenco gvidonta la kompatindan turmentitan homaron en la promesitan sopiratan landon de la paco.

Postskripto de la redakcio

La demonstracioj „Neniam-plu-milito“ en Bremen kiel en aliaj germanaj urboj komence devis okazi sub la ĉielo, sed laŭ ordono de la regna registaro estis malpermesataj. En Bremen la demonstracio tial okazis en ĉambrego. La konfuzo de la interna ekonomio kreskas de tago al tago. La dolaro eksaltis ĝis la fantazia alto de $\frac{3}{4}$ milionoj da papermarkoj, t. e., ke 4 gm, kiuj antaŭ la milito estis 1 dolaro, hodiaŭ nur ankoraŭ estas $\frac{1}{750000}$ dolaro. Tion oni apenaŭ povas prezenti al si; kaj la marko alproksimiĝas al rusa valuto. La mizero kreskas. Eksplozoj pro malsato kiel en Breslaŭ, Frankfurt eble ankaŭ aliloke okazos. La registaro havas nek prudenton, nek kuraĝon. Ĝi regadas per malpermesoj. Oportune, sed danĝere. Kaj laŭ nia opinio: krime. La muna registaro eksigu! Urgas treege, ke ĉiuj, kiuj amas sian patrujon, helpu al aktiva politiko interna kaj ekstera. Alie enlanda milito estos neevitebla.

Ankaŭ niaj amikoj en la koncernaj landoj, kiel Anglio, Ameriko, Francio, Belgio kompreneble zorgu, ke iliaj registaroj pritraktu decide kaj rapide la seriozan problemon de la restarigo de la eŭropa ekonomio.

El la sortlibro de la homaro

De Paul Mühsam

Ĉi-tiun libron, aperintan 1919 en la eldonejo de Gotthold Rödél u. Co., Dresden, post kiu leviĝas la ombroj de la mondmilito, la aŭtoro skribis, por honor-mencii la mortintojn, memori la vivantojn kaj admoni la venontojn.

Ni el la libro donas jenajn provaĵojn:

1. „La vilaĝanino kaj ŝia filo“ paĝoj 26—30.
2. „Viro kontraŭ viro“ paĝoj 45—53.

1. La vilaĝanino kaj ŝia filo

Vilaĝanino: Ĉu ne estas frenezo, ke tiom multe da juneca sango devos flui sur la batalkampoj? Pro kio? Ne, tion mi ne komprenas.

Filo: Patrino, mi militiras, por batali por rajto kaj vero.

V.: Por rajto kaj vero. Ja, tion ili ĉiuj diras. Kaj transe, ĉu tie ne estas same? Ĉu tie ne ankaŭ milionoj da homoj staras antaŭ sia patrino kaj diras, mi foriras, batali por rajto kaj vero? Mi ne multon komprenas pri tio. Sed io ĉi-tiurilate ne estas en ordo, mia filo. Kie efektive nun estas rajto kaj vero?

F.: Ĉe ni, patrino. Ja ne povas esti alie, ĉie tio estas presata kaj skribata.

V.: Kaj ĉu eble transe ne estas same? Certe ili ankaŭ presas kaj skribas, ke ĉe ili estas rajto kaj vero. Kaj pri tio cerbumadas mia malsaĝa kapo, kiel estas eble, ke ĉi-tie tuta popolo ĵuras je io, kaj transe tuta popolo je la malo. Ne, tion mi ne komprenas. Kaj plie mi pensas: Eble — Dio pardonu al mi, se mi pekas — eble la vero ne estas ĉe ni, sed transe aŭ eble en la mezo aŭ eble nenie.

F.: La bataliloj decidus pri tio.

V.: Tion oni ofte aŭdas. Ankaŭ tion mi ne povas kompreni per mia malsaĝa prudento. Kial la bataliloj povas scii, kie estas rajto kaj vero? La bataliloj maksimume do povas pruvi, kiu estas pli forta, aŭ pli ruza, sed nenia-okaze, kiu estas prava.

F.: Ŝajnas al mi, ke la pli forta ĉiam estas prava, ankaŭ, se li ne estas prava.

V.: Povas esti. Mi ĝis nun ĉiam kredis, ke la rajto estas Dia, kaj ne homa.

F.: Eĉ, se vi estas prava, kion tio utilas al mi? Eĉ, se estas frenezo, ke unu disŝiras la alian, la frenezo forigas la prudenton de la plej saĝaj kiel dometon el kartoj.

Jes, patrino, la unuopulo nur estas malforta kano. En la milito oni faskigas la homojn kiel garbojn sur la kampo. Kaj eĉ, se estus inter ili tia kano, kiun Dio elektis kiel fluton, por ludi sur ĝi siajn kantojn pri amo, rajto kaj vero, oni tamen faskigus ĝin kun miloj da aliaj.

V.: Tio estas vera. Senpova estas la unuopa homo; kaj ĝia voĉo perdiĝas en la bruego de la tuto. Laŭ mia opinio estus plej bone, ke ankaŭ ekzistus faskoj, kiuj rekte starus, eĉ tiam, kiam la ventego de la milito transblovegus ilin. Mi pri tio ja ne komprenas ion, sed miaopinie devus ekzisti sekreta interkonsento inter la homoj; ke ĉiu nur faras tion, kion li povas prirespondi antaŭ Dio kaj konscienco; malgraŭ morto kaj diablo. Tiam certe ekzistus plenkampo da rektaj faskoj kaj se ili starus sufiĉe dense, eĉ la plej furioza ventego ne estus kapabla, terenjeti ilin. Ja restus ankoraŭ sufiĉe da homoj kiuj povus verŝi sian sangon, se estus necese; restus sufiĉe de tiuj, kiujn pelas la gloramo, la murdamo aŭ emo al aventuroj, la facilanimeco, erarigita kredo, senutila vivo, la mizero en la propra hejmo aŭ io alia.

Tiokaze restus konservataj al la lando la plej valoraj, kaj ili hejme povus kulturi la kampojn kaj eble ili baldaŭ fariĝus sufiĉe povaj, por ankaŭ la aliajn, la sovaĝajn, savi for de la morto. Vi ridas. Nu ja, tio nur estas miaj internaj pensoj; ĉar mi ja nenion komprenas pri tio.

F.: Vi pensas per la koro, patrino, pro tio vi kredas, ke ĉiuj homoj estas tiel noblaj kiel vi.

V.: Ili ne estas malnoblaj. Mi nur ĉiam konstatis, ke tro multe da estas senpensaj. Kaj tio, kion vi diris pri la koro, certe estas vera. Sed sole per la prudento oni ne ĉion povas plenumi; kaj plie, kiu scias, ĉu ne iam, en malproksimega tempo, la mortmalsana mondo resaniĝos ĝuste je la koro!

2. Viro kontraŭ viro

La unua: Balbutu vian lastan preĝon.

La alia: Nur kun vi.

La u.: Mi estas sufiĉe forta, terenbati vin.

La a.: Mi estas sufiĉe pia, restarigi vin.
La u.: Vi estas mia malamiko.
La a.: Mi estas homo.
La u.: Ankaŭ mi ne estas diablo. Por mi vi estas malamiko.
La a.: Mi estas filo de patrino.
La u.: Ankaŭ min ne mamnutris hundino. Por mi vi estas malamiko.
La a.: Arĝentaj infanvoĉoj vokas min patro.
La u.: Sama beno estas donacita al mi. Ne tuŝu je tio, por ke la rememoro ne fandu la kirason. Por mi vi estas malamiko. Mi estas devigata, mortigi vin.
La a.: Ĉu devigata?
La u.: Estas devo, ŝirmi la hejmlandon.
La a.: Kiu atakis ĝin?
La u.: Via popolo.
La a.: Ankaŭ la mia iris militon pro tia ŝirmo.
La u.: Nenece estas, ŝirmi tion, kio ne estas en danĝero. Nin minacis atako!
La a.: Kiu diris al vi tion?
La u.: La tuta lando krias, la montoj eĥas tion.
La a.: Nia lando postulas venĝon pro krima surprizatako.
La u.: Via lando mensogas.
La a.: Aŭ viaj montoj eĥas eraron.
La u.: Neniam.
La a.: Dekstre milionoj ĵuras: Vi estas pli nigraj ol nokta nubaro. Maldekstre milionoj: Ni estas pli blankaj ol novfalinta neĝo. Kie estas vero? Kiu volas decidi?
La u.: Ĉi-tie ne estas nia tasko, serĉi la veron, sed nur plenumi la devon.
La a.: Respondu el tuta koro! Kio estas via devo?
La u.: Mortigi vin!
La a.: Kiu ordonis tion al vi?
La u.: La patrolando.
La a.: Ĉu vi do ne scias, ke Dio diras: Ne mortigu!
La u.: Danĝero nuligas la dekalogon.
La a.: Nur peko estas kapabla, ignori la signojn de Dio. Esploru pli profunden! Kial via patrolando ordonis al vi, mortigi min?
La u.: Por ke ĝi venku!
La a.: Esploru pli profunden! Kial ĝi volas venki?
La u.: Savite el danĝero, ĝi volas sklavigi vian popolon por garantii la estontecon!
La a.: La ĉielo helpas kontraŭ sklavĉenoj. La plej proksima generacio liberigos sin kaj disŝiros la katenojn kiel araneaĵon: Tiam mia filo mortigos la edzon de via filino.
La u.: Ĝin venĝos mia nepo.
La a.: Kaj tiamaniere dum jarcentoj? Terura penso!
La u.: Tamen neŝanĝeble.
La a.: Do la vivo estas senutila!
La u.: Mi ne scias helpon.
La a.: Manon donu al mi, kaj ni estas fratoj.

La u.: La manon al la malamiko?
La a.: Al la amiko.
La u.: Amiko nur post packontrakto.
La a.: Vian manon donu al mi, kaj interkonsentita estas nia paco.
La u.: Satano parolas el vi.
La a.: Aŭ Dio.
La u.: Kaj se ni ĉiuj farus tion, — kie restus la venko?
La a.: Se ĉiuj farus tion, tiam unu spirito ekregus la homaron kaj ni ĉiuj farus la samon. Tiam neniu estus sklaviganta venkinto kaj neniu venĝplena venkito. Tial forigu la dorndraton de la malamo. — Benanta lumo por la floro de la konkordo.
 Forŝovelu la rubon de la senkompata kalumnio. — Pioniru vojojn por kora konfido!
 Enterigu la velkintan, putrintan vorton „malamiko“ — faru spacon por interpopola amikeco!
 Ĵetu nuben zorge kulturitan malamon. Konstruu pontojn de lando al lando trans putrantajn fostojn!
 Por eterne mallevu la hom-turmentegilon de la milito en la „lagon de la forgeso“. — Pordoj, pordegoj kaj koroj estu malfermataj por la himnoj de la psalterioj kaj harpoj de la paco.
La u.: Vere, nun mi preskaŭ kredas, ke Dio parolas el vi.
La a.: Kaj la spirite-blindigitaj ĉi tie kaj transe vokas: Popolo en danĝero! Kaj ĉiuj nur bezonus voki „For la batalilojn!“ Kia tragedio, batali kontraŭ nenio kaj falĉi freŝajn homkorpojn. Ĉu sur la tuta tero eĉ nur unu atakis vin?
La u.: Neniu.
La a.: Eble vian fraton?
La u.: Neniu.
La a.: Viajn gepatrojn? Viajn kunulojn? Unu el viaj samurbanoj? Ĉu vi eble aŭdis pri amiko de amiko, kiu estis minacata de la malamiko?
La u.: Pri neniu, neniu!
La a.: Kaj same ĉie en ĉiuj landoj. Neniu estis atakata! Ne ĉi-tie, ne transe. Eraro kaj malprudento tie kiel ĉi-tie! Bedaurindaj estaĵoj! Feliĉon serĉantaj kreaturoj de Dio. Pilko de la vento! Delikataj kiel tremanta florpolvero kaj atakigitaj de demonoj de l' nokto kiel virbovoj.
 La sentoj konfuzitaj per trompaĵo de la diablo. La cerboj ebrigitaj per inferaj trinkaĵoj, faritaj el trompo. La animoj traboritaj per ponardoj de mensogaj vortoj. La Diaj leĝoj supersutitaj per mokego kaj ridado.
 Ĉiuj sanktaj vazoj senpripense detruitaj. Ĉiu alta penso pereigita per fajro kaj glavo. Ĉiu nobla sento tiritra tra ŝlimo kaj makulita per malpuraĵo. Ĉiu delikata eksento sufokigita kun

mokanta bruteco. Ĉiu belo palpita kaj makulita de sangaj fingroj.

Mortintoj, eltombiĝu, por sciigi la veron. Steloj, kantu ĝin per ĉiela kantado en la orelojn de la homoj. Lumanta suno, skribu ĝin per via ora grifelo sur ĉiujn foliojn de la printempo. Plaŭdu ĝin ĉiuj fontoj de la tero. Riveroj, portu ĝin sur viaj dorsoj tra sopirantaj landoj kaj verŝu ĝin en la marojn, por ke la alfluo eterne jetu ĝin borden. Venu de ĉiuj sanktaj altoj, vi torĉportantoj de la popoloj, via tasko estas, fari altan verkon por la suferanta homaro; pli grandan, ol ĉiu granda verko de la estinteco. Diru, kio disigas nin? Nenio ol limfosto, enramita de mortecaj homoj. Eksciuj, kio kunigas nin: La eterneca kunigas nin kaj la amo de Dio, kiu estas nia komuna patro. Sama ĝojo en sama feliĉo, sama funebro en sama doloro. Espero kaj maltrankvileco estas same via kiel mia.

Via same kiel mia vivo estas plena je sopiremo al altaj celoj kaj je zorgo pri malgravaĵoj. Ni ĉiuj estas homoj mortecaj kaj nia vivo estas tro mallonga, por perdi en iluzio eĉ unu minuton. Vere, la sorto amasigas sur nin sufiĉe da suferoj. Ĉiuj, ĉiuj devas kolekti foliojn de Maja verdaĵo por la popolojn feliĉiganta krono; — amo venku malamon, helpema kompato mildigu suferon!

Pli bone ni ankaŭ ne povas servi al la patrolando, kiun elkore amas la sentanto, ol se ni metas tion, kio estas komuna al ĉiuj, super tion, kio disigas nin kaj tiel kunigas la popolojn al ligo, ĉar nur sub tia ŝirmo la patrolando povas esti trankvila sed tremi ĝi devas, kiom longe kanonoj ĝin gardas!

La u.: Plej nobla, ne rifuzu mian manon, kiu pekma-kulita leviĝis kontraŭ vi.

La a.: Neniam estas tro malfrue, por amikiĝi.

La u.: Antaŭ malmultaj sekundoj ankoraŭ malamiko kaj malamiko.

La a.: Nun du homoj!

La u.: Du fratoj!

H.

Pri la problemo de la germana-franca interkonsento

En la Pariza gazeto „Matin“ de la 5. julio 1923 senatano Henri de Jouvenal demandas: Kiu riparu la detruitajn regionojn, Francio aŭ Germanio?

Ni respondas al li, ke dum la lastaj jaroj de la germana flanko sufiĉe ofte estas deklarite, ke Germanio akceptas la devon ripari kaj sin proponas laŭpove laboradi.

Se la rekonstruo ĝis hodiaŭ ne tiom progresis, kiom ĝi estus povinta, certe ne sole Germanio estas kulpa, sed ankaŭ Francio, ĉar ĝi malfaciligis kaj parte malhelpis la laboron.

Precipe ni opinias malfaciliga, ke sur ambaŭ flankoj ankoraŭ ĉiam daŭradas la regado laŭ la malnova sistemo.

Ja estas unu el la ĉefaj rezultaĵoj de la milito postuli de ĉiuj: forigon de la sekreta diplomatio, rektan interkomunikon inter la popoloj.

Sed la plenumon de ĉi tiu postulo oni ĝis nun malebligis. Tio dokumentas nek bonan volon, nek grandan kapablecon de la potenculoj, kiuj eble scietas, ke alikaze ilia gloro finiĝos. Des pli malmulte ni havas kaŭzon subteni ilin.

Necesa do estas senpera interkomuniko.

La germanaj pacifistoj, havantaj en Germanio multe pli da samideanoj ol estas ekkoneble el la membronombro de la organizaĵo, nur ne disponantaj pri tiom da monrimedoj kiel la kontraŭuloj kaj pro tio ne povantaj publike tiom bruadi, nun pli forte ol antaŭe klopodos forigi la konflikton inter Germanio kaj Francio.

G.

*

Alvoko al repaciga ofero de la Germana popolo al la Franca popolo

De Lilli Fannasch

(El la gazeto „Die Menschheit“)

Ĉu la Germana popolo trovos kuraĝon kaj forton por repaciga ofero?

Por libervola ofero de la plej diversaj sociaj klasoj? Por ofero, kio sin levas el la amo kaj varmeco de la koro?

Nur per tia ago nia popolo povas liberigi sin el la spasma de malamo kaj pretendemo!

Nur tia ago la Francan popolon povas liberigi de timo kaj zorgo pri sia sekureco!

Nur tiamaniere povas esti pretigata la vojo al vera paco.

Dedum 4 jaroj oni multon parolis pri la „plenumvolo“. Sed kie restis la agoj? Nur sekve de daŭra devigo oni plenumis.

La repaciga ofero libervola estu simbolo por nia bona volo. Estu konfeso, ke ni korprofunde bedaruras la malfeliĉon, kiun kaŭzis niaj militemuloj!

Unu ago pruvas pli ol milionoj da vortoj!

Ni nenion atendu de nia registaro. Dedum jaroj ĝi marĉandas pro la plenumo. Ni uzu nian rajton pri „persona libereco“ helpante rekonstrui. Per tio ni kreos por niaj ambaŭ suferantaj popoloj larĝfundamentan popularan ligon, kiu estos la sole certa garantio kontraŭ estontaj militdanĝeroj.

Neniu intrigema registaro sukcesos detrui tian popolligon! Nur per tia ligo ni povas prepari ĉi-tie kaj transe homindecan ekzistadon por la nuna kaj estontaj generacioj.

Nun estas la plej suferiga tempo. Sorttempo! Nun la Germana popolo prezentu la manon al la Franca. Nun en la mondo ekestu nova forta volemo!

„Kiom ni oferis dedum jaroj“, mi aŭdas veplendi; „patrojn, filojn, edzojn, regnan help-oferon, „Ruhr-oferon ni donis; mal-riĉuloj ni fariĝis!“ Ĉu vi ne sentas la kontraston? Tiuj oferoj estis ordonitaj! Ili helpis al la potencoj de la akiremo, kiuj kondukis vin al ruiniĝo. Sang-oferoj, sklav-oferoj de la detruigo ili estis.

Liberec-oferon vi ĉi-foje donu. Oferon al kreema ago, el kiu elkresku nova patrolando, homarlando.

Anstataŭ ŝiri vundojn, ĝi kuracu ilin!

Anstataŭ semi malamon, ĝi estigu konfidon!

„Multon“ ja ne povas doni la unuopulo. Sed oferemo ne estas pesata laŭ pezo kaj multe da eroj faras „multon“! Dependas de la eroj; estas necese, ke milionoj en donema amo etendu la manojn trans la limfostojn!

Kiamaniere realigi la oferon?

Ni ne pensas pri malviglaj amaskunvenoj, sed pri malgrandaj ofer-societoj, kiel junular-unuiĝoj, katolikaj kaj protestantaj komunumoj, sindikatoj, pacsocietoj k. t. p., kiuj sendu siajn oferaĵojn al samcelaj komunumoj en Franclando aŭ rekte al la komunumoj en la rekonstru-regiono. Tiamaniere ekestos personaj interrilatoj de popolo al popolo. Krom mono kaj biloj estus konsiderindaj juvelaĵoj kaj valoraĵoj. Ĉiu ofer-societo celu, zorgi pri la konstruo de almenaŭ unu domo. Proponojn pri la realigo de la ofero volonte akceptas la redakcio.

H.

*

G. W. Meyer, ano de la „Internacia Ligo kontraŭ militservo“ plilarĝigis la ideon pri rekta helpo. Li opinias, ke ĉiuj noblanimuloj tra la tuta mondo kunlaboru; tiel li direktas jenan leteron al siaj amikoj ĉiulandaj:

Bremen, 68 Sielwall, Juli 1923.

DEUTSCHE FRIEDENSGESELLSCHAFT ORTSGRUPPE BREMEN

(Germana Societo Pacifista Loka grupo Bremen)

Al ĉiuj, kies celoj estas paco kaj progreso

Atentu jenon:

1. Vera kaj daŭra paco estas necesega por la bonfarto de la homaro. Se oni konsentas, ke malamo kaj miopa egoismo daŭradu regi la internacian politikon, reaj militoj estoj la sekvo.
2. Nepraj kondiĉoj por garantii faktan pacon estas:
 - a) La baldaŭa rekonstruo de la detruitaj regionoj en Francio kaj Belgio, alikaze la malamo daŭrados.
 - b) Malpliigo de la monpago, per kiu la germana popolo estas ŝargita, alikaze ekestas malespero.
3. La „Germana Societo Pacifista“ laborante por paciĝo inter la popoloj ne kontestas la devon de la germana popolo kunhelpi rekonstrui laŭ sia tuta povo.
4. Membroj de la Germana Societo Pacifista ekkonante la dangeregon de la stato kaj nepre malkontentaj pri la daŭra marĉando de la diplomattoj kolektis en Ger-

manio monon kaj valoraĵojn. La kolektaĵo estas destinata por la rekonstruo de la detruitaj regionoj. Ĉi tiu propravola oferaĵo ekamikigu la iamajn malamikojn kaj malprigrandigu la germanan pagon.

5. Por fari ĉi tiun entreprenon granda sukceso, estas necese la kunlaborado de pacemaj viroj kaj virinoj ĉiulandaj.

Do ankaŭ la via.

6. Kiel fari:

- a) Petu en nia nomo vian bankon aŭ ŝparkason aranĝi konton por la

*Deutsche Friedensgesellschaft
87 Zimmerstrasse, Berlin SW 63*

- b) Komisiu vian bankon transpagi sufiĉan sumon el via konto en la konton de la „Deutsche Friedensgesellschaft“ kaj sendu al ĉi tiu kontulo ŝuldateston.
- c) Informu ĉi tiun oficejon pri via pago dirante vian precizan adreson, por ke ni povu konfirmi la ricevon kaj informi vin pri la kolektado.
- d) Farigu precizajn kopiaĵojn de ĉi tiu letero. Sendu po 2 al ĉiu el viaj amikoj, liverantoj, klientoj, por laste atingi ĉiun urbon kaj ĉiun vilaĝon. Surskribu vian nomon sur la koverton, por ke la adresato sciu pri la sendinto.
- e) Instigu vian gazeton subteni nin.

Via laboro helpos konstrui la vojon al la vera paco kaj forigi la militon — por ĉiam. Ĉi tiu penso estu via gvidilo, kiel ĝi gvidas nin.

Dankon por via kunlaboro.

**DEUTSCHE FRIEDENSGESELLSCHAFT
ORTSGRUPPE BREMEN**

Adresoj: *Dr. phil. Karl Menges*, prezidanto

G. W. Meyer, vicprezidanto

Donacojn oni ankaŭ povas pagi al la eldonejo, kiu transsendos ilin. G.

Diversaĵoj

Pri la 13. germana gimnasta festo okazinta en München, 15.—22. julio, ankaŭ eksterlande atentu

La antaŭa gimnasta festo okazis en Leipzig, en la jaro 1913, kiam la ekonomia stato en Germanio estis relative favora, kiam la valoro de la salajro estis multe pli granda ol hodiaŭ. La tiama partopreno estis grandega.

Tiom da partoprenontoj oni hodiaŭ ne povis esperi.

Sed kia mirigo: la nombro treege superis la cititan. Pli ol 200.000 gimnastoj alvenis en München kiel delegitoj de gimnastaj societoj havantaj kune pli ol 2 milionojn da membroj. Tio pruvas la fortan volon esti unu popolo; kaj ĉi tiu sentado des pli fortiĝas, ju pli kreskas la ekstera kaj interna premoj.

Kelkiuj timis pro la festo. Oni sciu, ke la gimnast-societoj estis fondataj, kiam Germanio estis venkita kaj

subpremita de Napoleono. La gimnastoj estis destinataj kiel batalontoj por rekonkeri la germanan liberecon.

Car la mentalo restis la sama dum la tuta jarcento, poste nur iom ŝanĝiĝis imperialismen, oni nun timis, ke la gimnasta festo en München fariĝu la antaŭtakto al enlanda milito.

Sed ĉio restis trankvila, kvankam la bavaraĵ Hitlergvardioj subtenataj parte per franca mono, parte per germana industrikapitalo viglege penadis gajni la gimnastojn por siaj militaj celoj. Sed ili indigne rifuzis ilin Rimarkinde estas, ke oni en la procesio de la gimnastoj portis multe da flagoj en la koloroj de la respubliko: „nigra-ruga-ora“. La konduto de la gimnastoj montras klare la germanan pacemon, kiun oni ankaŭ povis konstati en aliaj klasoj, ekz. ĉe la vilaĝanoj. Kompreneble ni ne asertas, ke la gimnastoj estas pacifistoj.

La konvinko, ke militoj ne plu estas konvenaj, ke ili ne plu akordiĝas kun nia naturekkono, ke ili estas malmoralaj k. t. p. nepre ankoraŭ mankas al la plimulto. Sed sendube estas, ke militemo kaj atakemo nenie montras sin.

G.

Filmproduktada malsparo

En Los Anĝelos oni produktas „Metro“-filmon, kiu kostos ne malpli ol 60 000 dolarojn aŭ ĉ. 10 miliardojn da germanaj markoj. Oni konstruis grandan porŝipan kanalon kaj du kompletajn kruciĝantajn stratojn. Post uzo ĉi tiuj konstruitaĵoj nur havas materialan valoron. Kiel en Ameriko tiel ankaŭ en Germanlando multaj filmproduktantoj estas fieraj elspezi laŭeble plej altajn sumojn por produktado, kaj senutile malŝpari por la aranĝo valoregan materialon kaj laborforton. Malgraŭe ke en Germanlando kaj ankaŭ en aliaj landoj milionoj da homoj ne havas loĝejon aŭ devas vivi malsanige dense, tamen oni ĉe la filmproduktado preskaŭ freneze malŝparas.

Ni ja ne ĝenerale kondamnas la filmon. Ni ŝatas ĝin kiel distrilon kaj instruilon. Sed ni turnas nin kontraŭ la produktadmaniero, kaj samtempe kontraŭ ĉia malŝparo, ĉia lukso tiom longe, kiom ankoraŭ mizero ie al iu homo la teron faras infero.

Se la valoraĵoj de la tero kaj la sin ofertantaj laborfortoj por la homoj estus uzataj racie, la mizero certe baldaŭ ĉesus.

Eĥ nia urbo ekz. ekzistas miloj da rentuloj, vidvinoj kaj orfoj devigataj vivi de rento enspeziganta poŝare ne pli ol kostas $\frac{1}{20}$ funto da margarino.

Estas nepre devo zorgi, ke malŝparo estu malhelpata je la bono de tiaj mizeruloj. Ne estas demando pri ekstera organizo, aŭ pri posedo de la produktadrimedoj, pri socia tutaĵo aŭ individuo; sed sole demando pri interna sindono, pri morala prirespondeco.

G.

Amuzo estas peko

Du knaboj, la 7-jara Heinc kaj la 5-jara Walter starante antaŭ la fenestro rigardas sur la straton. Kaduka

maljunulo konata al ili preterlomas. La knaboj amuzas sin pri la stranga lamado kaj imitas ĝin.

Jen la patrino riproĉetas ilin dirante: „Karaj infanoj, ne estas dece moki pri la kompatindulo. Li ja estas maljunulo kaj krome malsana; moki pri li estas peko.“

Heinc iom pripensinte: „Strange — ĉiam: kio amuzas, tio estas peko.“

Por pripensi

„Iutage“, skribis Arnold Porée, „oni rakontis al mi ĉe la orbordo en Afriko, kiamaniere la negroj klarigas al si, ke la eŭropanoj estas helkoloraj. Ili diris, ke kiam dio demandis lin: „Kion vi faris kontraŭ via frato, la negro?“ li paliĝis por eterne.

„New York Herald“

komunikas el Fall-River, ke la kotonfabrikejoj pro treega debitmanko decidis, redukti la fabrikadon je 20—50 %. En mezeŭropo mankas al milionoj da homoj la necesegaj vestaĵoj. Jen rea rezulto de la multlaŭdata libera produktado.

Turisma politiko germana

Vigla propagando eksterlanda celas deteni viziti Germanion.

Ni tial, precipe por la Nürnberg-kongresanoj, opinias dezirinda oficialan artikolon pri la germana turisma politiko. Ni turnis nin al la „Reichszentrale für deutsche Verkehrswerbung“-Berlin (Regna Centra Oficejo Germana por altiri fremdulojn). La oficejo deklaris sin favora uzi la proponitan oportunon povi informi. Sed ĝi ne sendis al ni la deziritan artikolon. Ĉu ĝi fakte ne disponas pri komunikindaĵoj, kaj la malfavora propagando do estas prava?

Stinnes

laŭdire, estas asociita al Schneider-Creuzot, la konata armiluzino. Ni petas niajn amikojn ĉiulandajn komuniki al ni, ĉu kaj kia fremda kapitalo, kiom da ĝi, kaj kiam, estas plasata en via hejmo, kun ĉu kiuj en-kaj eksterlandaj grupoj kaj kiaproporcio? Estas necese koni la interligojn de la internacia grandkapitalo.

Estas dirate

ke Francio pruntas grandajn sumojn al Polio, Cehoslovakio, Rumanio, por ke ili kompletigu siajn armeojn. Kiu povas komuniki al ni detalojn?

Kie estas la protestoj

de la abstinenculoj kontraŭ vendo de alkoholo al la fremdaj garnizonoj ĉe Reĝno kaj Rur je malutilo de la malsatanta popolo?

Elmigrado

Diversaj ekonomiaj kaj psikaj kaŭzoj, detale priparolotaj pli poste, instigas multe da man-kaj kaplaboristoj en Germanlando, Pollando kaj kelkaj aliaj orienteŭropaj landoj elmigri. Tial ni elpetas komunikojn pri landoj konsiderindaj kiel estontaj hejmoj kaj la tieaj vitalaĵoj.

LIBROJ

Raoul H. France:

Liaj ĉefaj verkoj biologiaj estas:

1. Elementoj de la komparanta biologio. Leipzig 1923.
 2. La teknikaj laboroj de la kreskaĵoj. Berlin 1919.
 3. La vivleĝoj de urbo. München 1920.
 4. La pesilo de la vivo. Prien 1921. 3. eldono.
 5. La mondo kiel travivaĵo, elementoj de objektiva filozofio. Dresden 1923.
 6. La kulturo morgaŭa. Dresden 1922.
- Lia filozofia ĉefverko estas:
7. „Bios“. La leĝoj de la mondo. Heilbronn 1923. 2. eldono.

La verkoj estas germanlingvaj

K. Hassert: La ekonomia vivo de Germanio kaj la geografiaj fundamentoj. Eldonejo: Quelle u. Meyer. Leipzig 1923 (fundamenta nombro *M* 1.40, germanlingva).

Alphons Horten: La impostigo de la valorajoj (germanlingva). Berlin 1922.

Statistika regna oficejo: Niŭter Germanio. Ekonomia stato sub la sekvoj de la mondmilito. Berlin 1923. Zentralverlag G. m. b. H., Berlin W 35. (En germana, angla, franca, hispana kaj itala lingvoj.)

Paul Mühsam: El la sortlibro de la homaro. Dresden 1919, Gotthold Rödel & Co. (germanlingva).

Ludwig Rubiner: La homo estu la centro. Verlag Die Aktion. Berlin 1917 (germanlingva).

Oswald Spengler: La perejo de la Okcidento. C. H. Beck'sche Verlagsbuchhandlung, München 1920 (germanlingva).

La regna ministro por trafiko: La germanaj fervojoj 1910/1920. Verlag Julius Springer, Berlin 1923 (germanlingva).

El la enhavo de la sekvonta kajero:

- La esenco de la politiko / La homo kaj la universo /
La okulto en la moderna mondopiniaro /
La elkalkulo de la historiaj okazantaĵoj.

Niaj legantoj kaj amikoj

bonvolu helpi varbi abonantojn kaj tiamaniere ebligi al ni presigi legaĵon pli kaj pli abundan kaj multvaloran, je la profito de la legantaro mem.

Pri la pacmovado kaj ĝiaj kontraŭfortoj

en la diversaj landoj ni deziras daŭre esti informataj de niaj amikoj.

Ĉiujn librojn,

artajn foliojn k. t. p. aperantajn en Germanlando prizorgos
Industrie- und Handelsgesellschaft
„Continental“ m. b. H.
Bremen, Langenstr. 60
Fako: Libroekspedejo.

Deziroj kai almontroj

multnombraj por la plibonigo de nia gazeto estas dezirataj.

Ni celas interesi

pri niaj ideoj ankaŭ ne-Esperantistojn ĉiulandajn; bonvolu subteni nin niaj amikoj.

Pro tio ni petas traduki la artikolojn nacilingven kaj publikigi ilin, ĉu kompleta, ĉu parte, ĉu resume, kun la indiko: El „La Lumturo-Bremen, peresperanta gazeto-politika por la intereso de la homaro.“

Tiamaniere oni ankaŭ bonege propagandas Esperanton.

Esperanto-eldonejojn

ni atentigas pri nia intenco aranĝi en Bremeno legejon. Ni tial petas daŭre informi nin pri novaĵoj.

La Eksportfako de la Firmo

peras zorgeme ĉiun mendon kontraŭ sumo entuta, aŭ procentaĵo.

Kun aliaj Esperantogazetoj

ni deziras interŝanĝon.

Pri internaj germanaj aferoj

ni laŭbezone por niaj legantoj aldonos apartajn aldonojn.

Ĉiujare aperas 24 numeroj. La jarprezo por unu numero estas por Germanlando kaj Aŭstrio: fundamenta nombro 0,50 gm. ŝlosilnombro de la „Börsenverein der Deutschen Buchhändler“ (ligo de la germanaj eldonistoj). Nuntempa ŝlosilnombro 30000. Sekve la prezo de unu numero 0,50 gm \times 30000 = 15000 gm. Abonantoj el la mezvalutaj landoj kiel Finnlando, Latvio, Estonio, Litovio, Polio, Ruslando, Jugoslavio, Bulgarlando, Rumano, k. a. pagas plion de 100 %. La duonjara aŭ jara abonprezo estas la prezo de unu numero multobligata per 12, respektive 24 minus 50% da rabato. La nuna abonprezo do estas 12×15000 gm = 180000 gm minus 50% (90000) = 90000 gm. respektive 24×15000 gm = 360000 gm minus 50% (180000) = 180000 gm.

Kiu sendas ĝustatempe sian ĝuste kalkulitan abonprezon tiu kompreneble ne bezonas postpago daŭre de unu abono post-ajn altigojn. La ne-germanaj abonantoj pagu en la valuto de siaj landoj. Por la aliaj landoj valoras jenaj prezoj:

Tut-Amerikaj, Ĥina, Japana: 1 amerika dolaro; Brita: 4 ŝilingoj Svisa; 5 frankoj; Nederlanda: 2½ guldenoj, Dana, Sveda Norvega: 5 kronoj, Hispana: 10 pesetoj, Franca, Belga: 10 frankoj, Itala: 15 liroj, Ĉekoslovakio: 20 kronoj. Pagu al la Eldonejo: Industrie- und Handelsgesellschaft „Continental“ m. b. H. Bremen, Langenstr. 60 en bankkonton J. F. Schröder Bank K. a. A., Bremen, aŭ en poŝtekkonton Hamburg 33707, aŭ en rekomendita letero per monbiletoj aŭ ĉeko.

Kiu ne povas pagi la abonprezon tamen anoncu sin kiel abonanto, se li konsentas pre niaj ideoj, kaj bonvolu monsubteni nin laŭpove.

Anonprezoj: Por 1/1 paĝo 20 amerikaj dolaroj, 1/2 p. 12 dol., 1/4 p. 8 dol., 1/8 p. 5 dol., 1/16 p. 3 dol. Por malbonvalutaj landoj la prezoj moderiĝas je la duono.

Leteroj nur al la Eldonejo Industrie- und Handelsgesellschaft „Continental“ m. b. H., Bremen, Langenstr. 60. — Pri ne postulatitaj manuskriptoj ni ne garantias; resendo nur kontraŭ sendkostoj.

La tekston esperantigis aŭ korektis: H. Gerke kaj Ho. Heitmüller, Bremen.

Laŭleĝe deviga teksto germanlingva: Verlag (Eldonejo): Industrie- und Handelsgesellschaft „Continental“ m. b. H., Bremen, Langenstr. 60 — Druck (Presejo): Carl Schünemann, Bremen. — Verantwortlicher Schriftleiter (Responda Redaktisto): Johann Fildstedt, Bremen.

